

ASISTILO


n-ro 15

Printempo 1994 Printemps

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religikompara revuo
Association Internationale d'Étude des Enseignements Spirituels et Théologiques

ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj

Membro-grupo de IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco)
Neŭtrala asocio kunlaboranta kun WCRP (Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), Tutmonda Ekumena Ligo kaj UEA



**Unua Interreligia
Seminario
Esperantista :
Granda sukceso !**



Kanta vespero : ludas gitaron Pavla
Dvořáková, dekstre de ŝi, B.Westerhoff,
ŝia edzo Vladimir : la tri organizantoj !



Ekskursa posttagmezo :
enirponto de kastelo Orlik



Ĵus tranĉinte la kapon
de la paska "ŝafido"

Vorto de la redaktoro

Pro la nun tre baldaŭa Universala Kongreso en Seulo ni komencas la publikigadon de la religia materialo kolektita en Bangaloro per eltiraĵoj el koreaj kontribuaĵoj : Won-Budhistaj preĝa kanto kaj prelego.

Kaj jen jam la unuaj eĵoj de la tre sukcesa unua Interreligia Seminario Esperantista organizita de ASISTI : rezervu jam vian tempon por la dua ISE kiu okazos apud Budapeŝto dum tuta semajno ĉirkaŭ Pasko 1995.

Sed la WCRP-kolokvo "Mare Nostrum" planita en Arrout en septembro 1994 (vidu n-ron 14, p.5) tre probable ne okazos, pro la junultendaro ligita al la 6-a Monda Konferenco en Riva del Garda (I) en oktobro : la junulara sekcio de WCRP ne povis financi ambaŭ, bedaŭrinde !

Tiu ĉi numero – pli belaspekta kaj "profesieca" ol la lasta ĉu ne ?! – estis kompostata kaj ofsete presata ĉe Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno, kiel fintasko de staĝo ...pagita de la franca ŝtato : dankon al la FEL-oficistoj pro ilia helpo kaj pacienco, kaj al AFIE pro la malfermiteco kaj komprenemo de ties respondeculoj !

La redaktoro bedaŭrinde ne povos iri al Seulo (pro komprenebla manko da mono), kie tamen okazos la kutima IRKE pri "Ĉu religiaj praktikoj povas transiri naciajn kulturojn ?". Sed ni "rendevuos" pere de la n-ro 16 aŭtune ...almenaŭ mi esperegas !

Ligila Organo ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj – (ĉ. trimonata)

Redakcio : 7 rue Parmentier, F-18000 Bourges (Francio)

ASISTI-estraro : Prez. Yosimi Umeda, Ch. Lavarenne : sekretario-kasisto, Bradio Moro : vickasisto, Bernhard Westerhoff kaj Eva Farkas : kunvenoj, François Degoul : eksteraj rilatoj, Leif Nordenstorm : Religia Antologio.

Directeur de Publication : Ch. Lavarenne

Jarabono: triono de UEA-individua abono (MA): 100ff / 32gld / 29DM / 18\$ (duonpreze por malriĉaj landoj) al :

- franca poŝtkonto "Asistilo, n-ro 10421 77 R Marseille"

- UEA-konmto "asis-r"

- FEL-konto "clvr-n"

- norvega *postgiro* : "Ch. Lavarenne n-ro 0540-7849940"

- Marek Krainski, ul. Albanska 28/2, PL-60134 Poznan (laŭ interkonsento)

Subtena abono : ekde 150ff / 50gld / 50 DM / 30\$...

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem ; vi povas indiki adresojn de la ricevontoj.

ASISTI-kotizo 1994 : deviga por esti membro, kia ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-"MJ" : 9,5 gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko)

Subtena membro : ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40\$

...Ne forgesu kontribui, dankon !

Enhavo

Kontribuaĵo de Ekumena Konsilio de la Eklezioj dum WCRP-kolokvo en Cluny, de Hans Ucko (S)	p. 3
Malferma <i>Deklaracio</i> de la celebrado pri Parlamento de Religioj en Ĉikago (Usono)	p. 4
<i>Celoj por interkreda kunlaborado</i> (fina dokumento de <i>Sarva-dharma-sammelana</i> en Bangaloro)	p. 4
Al konstanta Monda Parlamento ? <i>La Internacia Interkreda Centro</i> en Oksfordo (GB)	p. 5
Preĝo-Kanto de Korea Won-Budhismo ĉe IARF-mondkongreso en Bangaloro (Bharato)	p. 5
Venonta IARF-Konferenco <i>Religio kaj Homrajtoj</i> en Cluj (Rumanio)	p. 5
Paskaj bondeziroj de la Papo en esperanto . Komentario de Carlo Sarandrea (I)	p. 5
Raporto pri la unua <i>Interreligia Seminario</i> en Tabor, de Bradio V. Moro (Usono/PL)	p. 6
<i>Konsiloj por ni mem kaj Defia paradokso : unueco en diverseco</i> (tekstoj verkitaj dum la Interreligia Seminario)	p. 6
ASISTI-a kunveno en Tabor (Ĉeĥio) : resumo de la diskutoj. Protokolis Bernhard Westerhoff (D)	p. 7
Letero al la seminariantoj, de M-roj Karel kaj Vlk, episkopoj de Hradec Kralove kaj Prago	p. 7
Scienco kaj kredo , intervjuo de P-ro Theo van Ruyskensvelde, de la Centro Koperniko (B)	p. 8
Kapitulaciigo antaŭ 750 jaroj, de la kataristoj en Montségur (F) kaj Katarisma ritario (fino)	p. 9
Pri <i>Kantoj de espero kaj libereco</i> de malliberigitaj monaĥinoj (Tibeto)	p. 12
Intervjuo kun la Dalai-Lamao en Bruselo (B)	p. 12
Interreligia <i>Komuna deklaro</i> en Lourdes (F)	p. 13
<i>Feliĉo</i> , de Lamao Göndun Rinpoĉhe	p. 13
Budhista somera universitato en Dhagpo Kagyu Ling (F)	p. 13
<i>La Serĉado de l' Sankta Gralo</i> (kun originala teksto el la XIII-a jc. en la romanika)	p. 14
Korea Won-Budhismo : reformita kredobjekto, de Bokin Kim (Koreio)	p. 18
Recenzo pri "...kaj la plej nobla estas AMO" de A. Marwaha, kaj <i>Mesaĝo</i> , de Sai Baba (Bharato)	p. 19
Lidia Zamenhof (mortinta antaŭ 50 jaroj): Heroldino de Homara Unueco, de Heinz Dieter Maas (D)	p. 20
Tradukero de Lidia Zamenhof el la <i>Libro de certeco</i> , de Baha'u'llah (Irano)	p. 22
Islam-kristanaj paroj, de Hosejn kaj Ghislaine Bayod (F)	p. 23
Leteroj : alĝeriano, J. Lépeix (F), Liliane Lambert (B), G. Tréanton (Movado Jean, CH), J. Kombe (Zairio)	p. 23
Mariavitoj – II : Rilatoj kun esperanto, laŭ Karl-Olof Sandgren (S)	p. 24
350-a datreveno de la naskiĝo de la kvakero William Penn (GB/Usono)	p. 24
<i>Granda Unueca Kredo</i> , de Jebumo (Ĉinio)	p. 25
Leteroj : de Riŝio Kumaro-daso (Aŭstralio), E. Hanhiniemi (SF/Aŭstralio), A. Schaeffer (A), M.C. Suresh (Bharato), R. C. Perier (Sri Lanko), D. Draper (N), S.S. Pradhan (Bharato), P-ro L. Bourdon op (F) kaj L. Mediano (E)	p. 26
Daŭraj kunvenoj de intensa meditado en Pireneoj (E)	p. 28
Forpasintoj : P-ro Beckers (B), Y. Numata (J), Rab. Melamed (Israelo), Past. G. Smiley, E.T. Benson (Usono)	p. 30
Anoncoj : Enhavo de <i>La japana budhano</i> , kaj <i>Nuntempaj spiritaj mesaĝoj</i> , de François Degoul (F)	p. 30
<i>Pripensoj</i> (pri eksa Jugoslavio), poemo de Michèle Freud (F) kaj <i>Sonĝo</i> de serba infano en Beogrado	p. 32
" <i>Interreligia milito</i> " ...ĉu vere ? , de Profesoro Shitoku A. Peel (B)	p. 32

*Kion ni povas kune fari , tion ni devus ne fari aparte **

Interreligia dialogo kiel ilo de kunlaborado

Fariĝis evidente, ke nia mondo hodiaŭ bezonas en sia tuta interdependeco tutmondajn respondojn al tutmondaj problemoj. Ne estas specife kristana paco aŭ juda justeco aŭ islama medipolitiko. Kaj eĉ se estas specifaj konfesiaj respondoj al la minacoj kontraŭ la monda vilaĝo, ni bezonas ekkonscii ke kion ni povas kune fari, tion ni devus ne fari aparte. Tiu principo devus esti la gvida principo de interreligia praktiko cent jarojn post 1893 kaj sojle de la 21-a jarcento. Celebri la centjariĝon de la *Monda Parlamento de Religioj*** ne signifas rigardi retroen sed antaŭen. Ni estas hodiaŭ interdependaj. Ni ne vivas, kiel en 1893, en geografie difinitaj areoj : hinduoj, budhistoj, kristanoj, ni vivas najbare en la tuta mondo. Tiu fakto devus nun trudi al ni **kune veni** kun niaj religiaj tradicioj, **ne por unuiĝi, ne por kunfandiĝi**, ne por fari miksaĵon, **sed akceptante niajn diferencojn**, engaĝigante nin al nova sinteno al la alia.

La *Ekumena Konsilio de la Eklezioj* lanĉis antaŭ tri jaroj programon por *Justeco, Paco kaj Integreco de la Kreitaro*, kiu celis kunigi kristanajn Ekleziojn responde al la minacoj kontraŭ justeco, paco kaj medio. Sed ne estas specifa kristana respondo al tiuj problemoj. La partopreno de la riĉeco de niaj religiaj tradicioj estas bezonata. Ni do bezonas konvencion inter membroj de diversaj religiaj tradicioj, komisiitaj serĉi rimedojn por resanigi kaj rebonigi tiun ĉi mondan vilaĝon.

Tiuj konvencioj devus esti pli ol deklaroj de religiaj hierarkioj. Ĉiuj devas senti sin koncernataj. Pensante mondscale, ni bezonas agi loke. Certaj principoj bezonas esti la nepraj kondiĉoj de tiaj provoj.

1/ Ni devas certigi ke ni, kiel homoj el diversaj religiaj tradicioj, ne provas altrudi niajn proprajn celojn al la socio. La celo, por interreligia kunlaborado, devas esti la celo de la socio. Kiel reprezentantoj de diversaj religiaj tradicioj aktivaj en la lukto kontraŭ ras-apartigo en Sud-Afriko, engaĝigitaj en diskutoj kun ANC pri la estonta Sud-Afriko, la reprezentantoj estis aldirataj ke ili ne atendu apartan lokon por religio, sed ke ili rigardu la novan Sud-Afrikon kiel komunan domon sen apartigaj muroj. Tio signifas ke *vox Dei* [la voĉo de Dio] estas *vox populi* [la voĉo de la popolo].

2/ Nia interreligia engaĝiĝo bezonas esti humila, kun integra memkritiko. La religioj ne kapablis multon fari de post 1893. De post 1893 ni havis du mond-militojn, la *Ŝoahon* aŭ "brulofero" [de la judoj], atombombon sur Hiroŝima, la leviĝon kaj falon de la Ŝtata Socialismo, la etnan purigadon. Niaj religiaj tradicioj estas ambiguaj kaj ankaŭ ebligis esti modelo pro la protesto de iuj, sed pli malfacile respondis kiam oni petis de ili esti konstruivaj kaj proponi novajn vojojn sekvindajn.

3/ Interreligia dialogo bezonas esti travidebla kaj honesta. **Ne devas esti kaŝita celo, nek la celo provi konverti uzante la nomon dialogo** anstataŭ la nomo misio aŭ *dawwa*. Kaj oni ne devus engaĝiĝi en dialogo por serĉi sian propran bonon, sed tiun de la komuna bono.

* Prelego ĉe WCRP-kolokvo en Cluny (F), septembro 1993.

** Fakte temis nur pri la celebrado de la 100-a datreveno de la Monda Parlamento de Religioj, kiu okazis nur unufoje en Ĉikago en 1893.

Renkonti la alian kiel alian

Estas ankaŭ farenda malkovro de la alia kiel iu kiu portas la absoluton en siaj propraj persono kaj religia tradicio. **Per la renkontiĝo kun la alia, mi estas eksponata al dimensioj de la vero kiujn mi ne konas nek posedas.** Mi ekkonscias ke la alia havas veron diferencon de la mia. Tio povas esti tre timiga. Fojfoje estas en interreligia dialogo emo ignori la realajn diferencojn inter niaj religiaj tradicioj. Estis en Bangaloro ĉe la Monda Parlamento de Religioj**, kiel ĉe aliaj interreligiaj kunvenoj, aspiro ĉe iuj el la partoprenantoj, dilui tiujn diferencojn en kunfandaĵon de la multaj kaj diferencaj tradicioj, dirante ke ĉiuj religioj diras la samon aŭ estas kiel diferencaj floroj. Tio povus esti rimedo por doni al ĉiu lokon, sed ŝajnas al mi pli probable reflekti timon de religia diverseco. Lerte dispoziciante niajn religiajn diferencojn, ni povas alveni al superreligio de universala amo, monda amikeco, kaj kosma konscio, modlita por la 21-a jarcento, sed ĝi estos religio simila al miksaĵo de glaciaĵo kaj ĵele-pudingo : facile glutebla sed sensubstanca.

Interreligia dialogo signifas renkonti la alian kiel alian aŭ vidalvide rigardi la nekonatan, **konsciigi ke la Realo estas pli ampleksa ol kion ni povos iam sondi.** La alia estas en sia alieco garantio ke la religia pilgrimo ne estas monopoligita aŭ ekspropriigita de iu. Grava instruo en la interreligia dialogo estas do ke **la alia donas al mi eblecon kreski en mia propra fido** kaj reciproke.

Por certigi ke la interreligia dialogo ne restos interesaĵo nur por incita elito, niaj respektivaj religiaj tradicioj bezonas stimuli edukadon malfermitan al la alia. Dimanĉlernejoj kaj iliaj ekvivalentoj en aliaj religiaj tradicioj bezonas prepari la infanojn al vivo en religie plureca mondo. Kutime nia religia edukado okazas izole de la aliaj komunumoj aŭ kontraŭ aŭ opone al ili, konscie aŭ senkonscie. Ni devas do, por eviti ke niaj religiaj tradicioj estos damaĝigataj, serĉi vojon al reamikiĝo, kie estas nova sperto pri la alia. Tio estas nia sperto, ke interreligia dialogo povas ebligi al ni malkovri la alian laŭ nova maniero. (...)

Toleremo ne plu sufiĉas. Ni bezonas estimon de la alia. Ni devas esti kapablaj iri transen. Ni hodiaŭ bezonas teologion de la alia. Tio estas demando por la religioj hodiaŭ. Mi senpacience esperas al la tempo kiam kristanoj dankos Dion pro tio ke estas islamanoj, islamanoj dankos Dion ke li revelaciis sin mem al la judoj, judoj dankos Dion pro la kristana vojo al Dio.

Interreligia dialogo ne povas esti limigita al nur sociaj agadoj. Tial ke, eĉ kiam ĉiuj prizonuloj estos malliberigitaj, ĉiuj nudaj homoj estos vestitaj, ĉiuj soifantoj estos ricevintaj akvon, ĉiuj malsatantoj nutritaj, ankoraŭ estos demando sonoranta en ni mem : **kiu ni estas, kion signifas esti homo, kien ni iras, kiu estas la alia ? Tio ĉi ankaŭ estas la plej grava kialo por interreligia dialogo.** Tio estas dimensio en la interreligia dialogo, kiu ne estas facile enkondukebla, sed ĝi tamen estas la plej grava demando pri nia interdependeco kun la dia kaj kun la aliaj.

Hans Ucko *

* Ano de interreligia komisiono ĉe *Ekumena Konsilio de Eklezioj*.

Okaze de la 100-a datreveno

Deklaracio de Ĉikago (4-9-1993)

La mondo agoniadas (...) Tio ne estas nepra, ĉar jam ekzistas la bazo por etiko, kiu ebligas pli bonan individuan kaj suman ordon kaj elkondukas for de malespero kaj ĥaoso. Ni estas virinoj kaj viroj, kiuj agnoskas la ordonojn kaj praktikojn de la religioj de la mondo :

Ni akcentas, ke ekzistas en la instruoj de la religioj komuna kerno de valoroj, formantaj la fundamenton por mondetiko ; ke **tiu vero** estas jam konata, sed ankoraŭ **devas esti vivata per la koro, kaj per agoj** ; ke ekzistas nerifuzebla, nepra normo por ĉiuj terenoj de la vivo, por familioj kaj komunumoj, por rasoj, nacioj kaj religioj. Jam ekzistas malnovegaj direktlinioj por la homa konduto, kiuj povas esti trovataj en la instruoj de la mondreligioj, kaj kiuj estas la kondiĉo por daŭrema mondordo.

Ni deklaras : Ĉiu el ni dependas de la bonstato de la tuto. Tial ni respektas la komunecon de la vivantaro, de la homoj, bestoj kaj plantoj, kaj zorgas pri la konservado de la tero, de la aero, de la akvo kaj de la grundo. Ni individue respondecas pri ĉio kion ni faras. Ĉiuj niaj decidoj, agoj kaj neglektoj havas konsekvencojn.

Ni devas trakti aliajn, kiel ni volas esti traktataj de aliaj. Ni devontigas nin respekti vivon kaj dignecon, individuecon kaj diversecon, tiel ke ĉiu persono estu home traktata – sen escepto. Ni devas praktiki paciencon kaj toleremon. Ni devas kapabli pardoni, lernante el la pasinteco, sed neniam permesante, ke ni mem restu malliberigitaj de la memoro de malamo. Malfermante niajn korojn unu al la alia, ni devas pro la afero de la mondkomuneco enterigi niajn etmensajn disputojn, kaj tiel praktiki kulturon de la solidareco kaj interligiteco.

Ni konsideras la homaron kiel nian familion. Ni devas celi esti amikemaj kaj noblaj. Ni ne rajtas vivi nur por ni mem, sed devas servi ankaŭ aliajn, kaj neniam forgesi la infanojn, la maljunulojn, la malriĉulojn, la suferantojn, la kriplulojn, la rifuĝintojn kaj la solulojn. Neniu estu iam konsiderata aŭ traktata kiel duaranga civitano, aŭ iel ajn ekspluatata. Estu egalrajta partnereco inter viro kaj virino. Ni ne rajtas praktiki ian ajn seksan malmoralajn. Ni devas forlasi ĉiujn formojn de supereco aŭ misuzo. Ni devontigas nin al **kulturo de neperforto**, de respekto, de justeco kaj de paco. Ni subpremos, nocos, torturos, eĉ **mortigos neniujn homojn**, kaj rezignas je perforto kiel rimedo por solvi disputojn.

Ni devas celi al justa sociala kaj ekonomia ordo, en kiu ĉiu ricevu la saman ŝancon eluzi ĉiujn siajn eblojn kiel homo. Ni devas paroli en vereco kaj agi kun konsento, dece rilatante kun ĉiuj kaj evitante antaŭjuĝojn kaj malamon. Ni ne rajtas ŝteli. Ni devas prefere venki la regadon de la potencemo, prestiĝemo, monemo kaj konsumemo, por krei justan kaj pacan mondon.

La tero ne povas esti ŝanĝata se ne ŝanĝiĝas unue la konscienco de la individuo. Ni promesas plivastigi nian komprenkapablon disciplinante niajn spiritojn per meditado, preĝado aŭ pozitiva pensado. Sen risko kaj preteco sin oferi, ne povas ekzisti fundamenta ŝanĝo. Tial ni devontigas nin al tiu mondetiko, al reciproka komprenemo (...) **Ni instigas ĉiujn, religiemajn aŭ ne, same fari**.

*Celoj por interkreda kunlaborado**

Religio, kreiva forto en la publika vivo

Respondante al la multaj krizaj situacioj en la mondo, kies originoj estas en religia konflikto, *Programo I* alvokas al la tuja formado de **konstanta interkreda organizaĵo** por kontroli kaj analizi la kondiĉojn kaj rilatojn en religio, politiko kaj kulturo ; kaj de grupo de interveno en krizoj kaj de solvo de konfliktoj, por esti "injektata" en situaciojn de grava religia konflikto kaj en konfliktojn inter religioj kaj ŝtatoj. Tiu organizaĵo aliĝus al UNO kiel neregistara organizaĵo.

Por disvolvi daŭran interkredan kunlaboradon kaj komprenon kaj por meti la spiritajn valorojn en la servon de la homa familio laŭ konstruiva maniero, ni vidas la bezonon de konstanta interkreda organizaĵo (forumo, parlamento aŭ konsilio). La *IIOCC*** povus servi kiel komenca kunordiga komitato. La nova konstanta organizaĵo liverus forumon por la prezento de malsamaj vidpunktoj, por dialogo, kaj por la ebla disvolvo de morala ĝenerala konsento pri aktualaj situacioj. Tiu organizaĵo certigus la justajn konsistecon kaj diskutan proceson de tiu organizaĵo. Ĝia konsisto reflektus ekvilibron inter viroj kaj virinoj (inkluzive junulojn), laikoj kaj religiaj gvidantoj kaj diferencaj vidpunktoj ene de la membro-grupoj. Ĝi kuraĝigus lokajn iniciatojn ligiĝi al la internacia organizaĵo kaj portus tiujn iniciatojn al la atento de la internacia komunumo.

Spiritualeco

Disvolvi konsciecon de sia ena estaĵo laŭ maniero kiu ampleksu la tutan universon kaj ĉion kio ekzistas, ebligante al la homoj fari ĉion en unueco kun la Superego ; antaŭenigi la konscion ke ĉiuj estas unu en la Absoluta Realo, tiel defiante falsajn materialismajn valorojn kaj la dividojn kiuj neas la spiritan unuecon. Spiritualeco devas esti kuraĝigata, studata kaj esprimata laŭ multegaj manieroj reprezentitaj de ĉiuj membro-grupoj.

Komunikado

En komunikado ni deziras kuraĝigi pli gravan interreagon kaj ĝustan reciprokan komprenon inter homoj de la diversaj sociaj niveloj, per : 1/ interkredaj retoj kaj agadoj por reciproka aŭskultado, lernado kaj vivado kunlaboreca, sur loka, nacia kaj tutmonda kampoj ; kaj 2/ disvolviĝo kaj uzo de artaj formoj, amaskomunikiloj kaj popoltradiciaj komunik-rimedo, kiuj esprimu interkredajn idealojn.

Edukado

Sur la kampo de edukado, disvolvi, pere de tutmondaj kaj lokaj retoj, universalan skizan *curriculum* kaj flekseblajn pakojn de studaj rimedoj, pri temoj kaj demandoj komunaj al ĉiuj popoloj, kiuj enkorpiĝu homajn valorojn kaj spegulu la diversecon de spiritaj tradicioj kaj kulturoj; diskonigi ilin sur la loka kampo per partoprenigaj procesoj kiuj veku konscion kaj ebligu al individuoj kaj komunumoj plenumi siajn bazajn edukajn bezonojn sur fizika, emocia, intelekta kaj spirita kampoj.

* Difinitaj dum la *Sarva-dharma-sammelana* en Bangaloro, aŭg. 93.

** Intern. Interkreda Organizaĵ-Kunordiga Komitato por 1993.

Al konstanta Monda Parlamento ? La Internacia Interkreda Centro

Eble la IIC, Internacia Interkreda Centro, malfermita en Oksfordo la 6-an de decembro 1993 de IARF (Internacia Asocio por Religia Libereco), WCF (Monda Kongreso de Kredo) kaj Westminster-a Kolegio "kun la subteno de multaj aliaj kolegioj kaj religiaj komunumoj, kaj britaj kaj eksterlandaj", estas unua paŝo en la direkto al konstanta Parlamento aŭ monda Konsilio de religioj ?

De tiam, kun la alveno de Nancy kaj Robert Traer (germano, sekretario de IARF) kaj Mary kaj Marcus Braybrooke (Prez. de IIOCC, vidu la antaŭan artikolon ĉi-apude), ĝi ankaŭ estas la oficejo de IARF kaj WCF : IIC, 2 Market Street, Oxford OX1 3EF, Britio (fakso 44 (0) 865 202 746).

Koreio : Won-Budhista preĝo-kanto

Young-Joo

Chun-jee young-kee ah-shim chung
man-sa yuh-eui ah shim tong
chun-jee yuh ah dong il-chae.

Strofo de Diaj Fortoj

La diaj fortoj de Ĉielo kaj Tero
interplektiĝas al mia origina naturo.

Ĉio glate iras laŭ mia intenco.

Tiam, mi estas interligita kun ĉiuj.

Mia menso kreskas tiel vasta kiel Ĉielo kaj Tero ;

Ĉielo, Tero kaj mi fariĝas unu.

Tiel, kune kun la fortoj de Ĉielo kaj Tero,
mi kreas justecon.



Rev. Hwa Taek Lee, delegito de la korea Won-Budhismo ĉe la IARF-kongreso en Bangaloro, en aŭgusto 1993. La Won-Budhistoj planas gastigi la venontan mondkongreson de IARF (en 1996).

La supra preĝo estis kantita la 17-an de aŭgusto dum la Interkreda Diservo de IARF. Vidu ankaŭ la prelegon de Bokin Kim, sur paĝo 18 .


IARF-Konferenco : Religio kaj Homrajtoj

En Cluj (Kolozsvár), Rumanio, ĉe la *Protestanta Instituto de Teologio*, de la 18-a ĝis 22-a de julio 1994.

La partoprenantoj konsideros la teologiajn situaciojn ĉe la diversaj religiaj grupoj en Eŭropo, kiuj aktive levas la demandon pri la religia libereco. Laborlingvoj : la angla, franca kaj germana [ĉu eĉ ne la rumana kaj hungara ?!]. Teoria limdato : 1-a de majo!, sed vi eble ankoraŭ povas faksi al D-ro Robert Traer : +44 (0)865 202746. (Tel : +44 (0)865 202744).

Paskaj bondeziroj de la Papo ankaŭ en esperanto

Legantoj de Asistilo memoros ke jam la papo unuafoje parolis publike en esperanto, antaŭ miliono da gejunuloj en Czestochowa. Oni atentis ankaŭ lian mesaĝon al la partoprenantoj de la Valenciana *Universala Kongreso*. Esperantistoj de longe deziris ke la papo uzu esperanton ankaŭ en siaj novjaraj kaj paskaj salutoj, kiujn li eldiras ĉiujare en dekoj da lingvoj. *Asistilo* partoprenis en la kampanjo de la itala Radikala Partio kiu petis letere ke "Esperanto estu aldonata (...) al la lingvoj jam uzataj por la bondeziroj (...) okaze de la Sankta Pasko". La deziro plenumiĝis : dum la paska dimanĉo, centmilo da aŭskultantoj kaj centmilionoj da televidantoj povis aŭdi la frazon "Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta !".



Esperanto enviciĝis post 55 aliaj lingvoj, ĵus antaŭ saluto eldirita en la pola, la gepatra lingvo de la papo. La novaĵagentejo ANSA, pluraj televid-stacioj kaj gazetoj raportis ke temas pri unuafoja uzo de Esperanto en la paska saluto. La papaj vortoj signifas novan ŝtupon de la rekono de Esperanto en Romo, post aprobo de liturgiaj tekstoj por meso en Esperanto (1990) kaj agnosko de IKUE kiel internacia privata asocio de fideluloj (1992).

Komentario de Carlo Sarandrea, kunredaktoro de *Espero Katolika* : "Ni ne povas diri, kiun signifon doni al la uzo de Esperanto fare de la Papo kaj kiuj estas la motivoj de ĝia okazigo. Verŝajne la historio diros. Certe, se la esperantlinva bondeziro okazis (...) pro la papa volo akcepti la rolon de esperanto kaj rekoni ĝian dignecon, tio tre feliĉigus nin, ĉar tio signifus altan rekonon por la Internacia Lingvo. Ĉiel ajn, ni povas tutcerte diri, ke esperanto ne ricevis subtenon tiom valoran kaj samtempe tiom konstantan dum la jaroj, ĉu per vortoj ĉu per faktoj, krom en la katolika Eklezio : la Papoj ĉiam ameme rigardis al la esperantista movado (...)."

Vidu *Esperanto*, 5-94, p.87 ; *L'esperanto* (itala), 14-5-94, p.5, kaj *Asistilo* n-ro 7 (printempo 91), p.21 kaj n-ro 9 (vintro 91-92), p.68 .

Unua Interreligia Seminario

Ĝi okazis en Tabor (Ĉeĥio), de la 31-3 ĝis 4-4-94.

Tiu ĉi kunveno esti la unua tia interreligia konferenco en Esperantujo, kaj la tridek partoprenantoj el ok landoj (Ĉeĥio, D, F, PL, Ukraino, H, GB kaj N) reprezentis romkatolikismon, protestantismon, kvakerismon, bahaismon, judismon kaj taoismon. La programon, kies sponsoro estis ASISTI, preparis Bernhard Westerhoff, bahaano el Germanujo, kaj Pavla Dvořáková el Prago. La praktikajn aranĝojn faris **Vladimir Dvorák**, kaj ĉiuj aranĝoj estis tiom bone faritaj, ke ili rezultis en la tuta kontento de ĉiuj partoprenantoj.

Bondezirojn sendis al la Seminario la **Kardinalo Miloslav Vlk**, Ĉefepiskopo de Prago [kaj esperantisto!], kaj Monsinjoro Karel Otčenášek, Episkopo de Hradec Králové. [Vidu iliajn leterojn sur apuda paĝo.]

La celo de la seminario estis esplorado de interreligia komunikado kaj interkompreno en Esperantujo, kun aparta emfazo pri la eventuala aktiva partopreno de diversreligiaj esperantistoj en la 6-a *Monda Konferenco pri Religio kaj Paco*, okazonta en oktobro 1994 en Italio.

Kroma celo estis la evoluigo de komuna religia praktiko, t.e. meditado, devotado aŭ preĝado, kiu taŭgus por tiaj konferencoj kaj ankaŭ por la kunvenoj de ASISTI en universalaj kongresoj de esperanto. Estis ĝenerala deziro kunserti ian religian praktikon, sed la afero estas malfacila, ĉar por iuj religiaj tradicioj (ekzemple budhismo kaj iugrade taoismo) eĉ la vorto "*Dio*" estas iom fremda. Kelkaj diversaj metodoj estis konkrete provitaj dum la seminario de tago al tago, kaj la ĝenerala sento de la partoprenantoj estis, ke bazo en silento kun laŭlegado de diversreligiaj teksteroj fare de individuoj estas la plej bona solvo.

Dum la seminario estis kelkaj **prelegoj** kaj prezentaĵoj, aparte prelego pri *Ĉu teologie pravigeblas supereco de unu religio super alia?* (**Bernhard Westerhoff**), kaj preleg-ciklo pri la temo "*La Homara Estonto*", laŭ taoismo (**Bradio Moro**), kvakerismo (**Martin Howard**, red. de *Kvakerita Esperantisto*), Komenio (**Pavla Dvořáková**), kaj "*Eko-dio*" (**Mike Sadler**).

La seminarianoj dividis sin dum pato de la tempo en laborgrupojn, kiuj produktis raportojn, kies formulado de Bernhard Westerhoff ricevis ĝeneralan aprobon. (La raportoj estas publikigitaj ĉi-apude.)

Dum la kunveno okazis ankaŭ la **provizora elekto de S-ro Bradio Moro al la posteno de Kasisto** de ASISTI.

La partoprenantoj ne nur laboris, sed havis la ŝancon ekskursi al la kastelo Orlik kaj **viziti la muzeon de la Husana movado** [la *Taboristoj*], la proto-protestanta movado de Jan Hus, kio estis kompreneble tre interesa de religia vidpunkto.

La valoro de la seminario tiom imponis la partoprenantojn, ke estis deziro okazigi novan tian kunvenon post unu jaro, dum la Paskaj ferioj, en Hungario, kion S-ino **Éva Farkas-Tatár** konsentis aranĝi; ŝi krome akceptis la respondecon aranĝi interreligian devotadon en la 1995 UK en Finnlando, kiu estos malfermita al la ĝenerala publiko, kaj tiel servos samtempe kiel propagandilo de Esperanto en la religia sfero. **Bradio Moro**

El la Supl. al *Tao* (organo de *Univ.Tao-Stud-Ligo Esp.*) n-ro 2, 3-94.

Finaj labor-dokumentoj

1. Konsiloj por ni mem

(...Ĉiu kiu nun legas la sekvon povas fariĝi unu el *ni* !)

Rilate la vivstilon de ĉiu el ni, ni formulas ke ni ĉiuj konsciis ke la vivo estas grandioza sistemo de reciproka interdependo; kaj ni, poezie, formulas por ni la sekvan vivdevizon: ni rigardu nur per la koro, en kiu ni plantu nenion krom la floro de la amo.

Konsumo servu spiritan evoluon. Ĝi okazu juste en rilato al aliaj kaj ĝuste en rilato al la propraj bezonoj. Neniel ĝi estu celo por si mem. Ni ne subnutru nian spiriton; kaj nian vivstilon gvidu pli la propra konscienco, kiu estu en harmonio kun Dio kaj la naturo, ol iuj opinioj de aliaj. (Ne finellaborita tekstkomenco)



La red. kun Eva Farkas, organizantino de la venonta ISE

2. Defia paradokso: Unueco en diverseco. Diskutinte la demandon "*Ĉu teologie pravigeblas supereco de unu religio super alia?*", ni, la partoprenantoj de la unua **Interreligia Seminario Esperantista**, resume vidas kvazaŭ paradokson: Ŝajnas ke samtempe kaj ĉiu havas sian propran religion, kaj ke estas nur unu religio por ĉiuj — metafore: estas kvazaŭ ni ĉiuj grimpus al unu montopinto ekirante ĉiu je propra elirpunkto piede de la monto, aŭ kvazaŭ ni formus grandan cirklon ĉirkaŭ unusola centra lumo, kiun ni ĉiuj aliras laŭ propra vojo. Disputi aŭ pri nia celo aŭ pri niaj vojoj estus evidente malracie kaj povus nur ĝeni je la antaŭeniĝo al tiu celo, pri kiu ni nur scias ke ĝi estas nepriskribeble grandioza kaj belega.

Tamen, la vojo ne ĉiam glatas kaj eblas malorientiĝi kaj perdi la celon. Tiukaze ni ja povas reciproke nin atentigi kaj subteni. Sed tio nepre okazu en formo de pleja delikateco, reciproka estimo, amikeco kaj sentrudigemo. Nia reciproka rilato estu unuavice tia de reciproka inspirado kaj lernado unu de la alia.

Tiel la ekzistantajn, plej diversajn religiajn sistemojn, konceptojn, vojojn kaj komunumojn, ni rigardas kvazaŭ abundan trezorejon el kiu ĉiu povas sin pliriĉigi. Aniĝi en iu el tiuj ĉiu faru nur laŭ sia propra libera volo kaj bontrovo. Inter si tiuj flegu la saman tolereman kaj amikan rilaton kiel ĝi estas postulata de ĉiu unuopa serĉanto kaj kredanto.

(Finredaktita de **B. Westerhoff**)

Esperantista en Tabor (Ĉeĥio)

ASISTI-a kunveno : Resumo de la diskutoj

1. ASISTILO. Ĝia aperado estu certigita kaj pli regula.
2. Ĉe-UK-a agado : – IRKE, laŭeble, pluorganizatu.
 - Same, lige kun ĝi, "Silentado".
 - ASISTI-jarkunveno pluokazu.
 - Nove estu lanĉita, unuafoje je la UK en Tampere, **Publika Interreligia Devotado**, kiu okazu enkadre de la kongresa programo sed ekster ĝi en publika ejo de la kongresurbo. Al ĝi estu invititaj kaj la kongresanoj kaj la urbanoj. Ĝia programo konsistu laŭeble el : enkonduka klarigo pri la celo de la aranĝo (akceli interreligian komprenemon), prezento de la programo mem, resp. eventuala ceremonio, muziko, laŭtlegado de tekstoj el diversaj religioj kaj spiritaj movadoj kiuj estu disponigitaj al la partoprenantoj en esperanto kaj traduko al la gastigurba lingvo (la tekstoj povas esti laŭtlegetaj tamen ankaŭ en aliaj lingvoj), silentado. La unuan PID en Tampere organizos Éva Farkas-Tatár kaj Bernhard Westerhoff kune kun laŭeble LKKano ; ĝi okazu laŭeble je la dimanĉa mateno antaŭ la kongresmalfermo (inter 8.00 kaj 9.30) kaj ne daŭru pli ol 45 minutojn ; la organizantoj sufiĉe frue informu UEA-n kaj petu ĝian aprobon ; laŭeble la aranĝo akiru la aŭspicion de la *Monda Konferenco pri Religio kaj Paco* (WCRP) aŭ alia granda interreligia oraganizaĵo same kiel de urbaj instancoj ; la prezidanto kaj sekretario de ASISTI estu daŭre tenataj informitaj pri la progreso de la preparoj.
3. ISE : – La unua estas konsiderata plensukcesa.
 - Dua estas planata por 1995 dum pasko en Hungario organizata de Éva Farkas-Tatár* kaj Erika Toth ; ĝi daŭru prefere unu semajnon kun baza periodo de kvar tagoj, okazu en studenthejmo aŭ simila , kaj eventuale la partoprenantoj kunvivadu pli malpli memzorgante ; provizora temo : *Vero / veroj – "Vero estas tio kio simpligas, ne tio kio estigas kaoson"**.*
 - En 1996 Pavla Dvořáková kaj B. Westerhoff pretas ĝin denove organizi en Ĉeĥio ; tiam lige kun la UK en somero kaj eventuale pli ampleksigita tema programo.
 - Ideo estas fari ĝin en 1997 en Baltio.
4. **Reprezentigo** ĉe neesperantistaj organizaĵoj :
 - La membreco en IARF estu plejbone ekspluatata.
 - Estu provata (per la prezidanto kaj la sekretario) aniĝi en WCRP (se la membreco atingeblas, probable ASISTI prefere fariĝu parto de ties eŭropa strukturo ĉar tie troviĝas ties absoluta plejmulto da membroj [ĉu ?]).
5. **Religia Antologio** : – Certe, laŭ la nunaj planoj, granda entrepreno kiu bezonos plurjaran preparadon.
 - Pavla Dvořáková interesiĝas pri eventuala kunlaboro
6. **Kunlaboro kun UEA** : La sekretario klopodos akiri la statuson de "aliĝinta" faka asocio de UEA.

Protokolis Bernhard Westerhoff

* Dohány u. 36/II/2 H-1077 Budapest (Tel (1) 142 20 82)

** Kvankam, laŭ Pavla Dvořáková : "Rilate la temon, se mi bone memoras, ni interkonsentis pri la religia lingvaĵo (...) Mi proponas ekzemple : *"Lingvo – barilo kaj ŝlosilo por interrel. dialogo"* (7-5-94).

Vidu ankaŭ la raporton de **Jaroslav Karhan** en *Heroldo*, 10-6-94, kaj foton en la sekva n-ro. Simila estis dissendita de Radio-Vieno la 1-5-94, kun titolo : *Mikromodelo de harmonio*. (Kompleta teksto havebla de J. Karhan).

Ekleziaj benoj

+ ! 1-3-1994, Bad Nauheim (D)
Ave Maria et Joseph !

Estimataj kaj karaj amikoj – samideanoj !

Ĉagrenas min ke mi ne povas partopreni Vian gravan kaj belan renkontiĝon. Tamen mi sendas kun plezuro tiujn ĉi malmultajn liniojn.

Plenkore mi salutas Vin ĉiujn – partoprenantojn kaj gastojn, kaj precipe la organizantojn kaj favorantojn.

La mondo, por ke ĝi ne pereu, bezonas religion kaj kredantajn homojn ankoraŭ pli urĝe ol en la pasintaj tempoj. Nur tiam ni – ĉiuj homoj – kondukos reciproke unu al la alia NE egoisme, indiferece, aŭ eĉ malamike, sed ni respektos nin reciproke, ni toleros unu la alian, senkulpigos, helpos kaj amos nin, eĉ se tio postulos oferojn (eble eĉ tre grandajn oferojn), se ni konsciiĝos ke ni estas gefiloj de unu Ĉiela Absoluta patro – Dio, plena de justeco, mizerikordo kaj amo, kaj se laŭ tio ni vivos. Tiel instruis nin, kristanojn, Jesuo Kristo kaj donas al ni ekzemplon kaj Forton por tia vivo kaj aktivado.

Dio donu, ke el tiu ĉi loko, kiu en nia religia historio estas gravega, el la loko kie vi nun kunestas, vi forportu hejmen plejble multe da pozitivaĵoj kaj ke restu kiel eble plej malmulte da negativaĵoj.

Komence de februaro mi partoprenis – kiel unusola episkopo kaj plejverŝajne unusola romkatolika kredanto el la iama Ĉeĥoslovakio – la tutmondan kongreson de la kristanoj kaj hebreoj en Jerusalemo. Ankaŭ tie la tre utilaj traktadoj rezultis en simila decido : serĉi kaj emfazi tion kio nin en bono kunigas, kaj toleri diferencojn.


En tiu ĉi spirito mi estas decidita, kune kun Vi kaj kun miaj kredantoj, daŭre laŭ niaj principoj klopodi pri ĉio bona kaj mi preĝas por Vi.

Benas

Zehná
+ Karel Otčenášek
biskup královéhradecký

+ Karel Otčenášek,
episkopo de
Hradec Králové

Prago 5-3-1994



Karaj samideanoj,

Mi salutas plenkore Vian internacian seminarion kiu okazas bedaŭrinde en la tagoj por mi malpli konvenaj por povi saluti Vin persone.

Miloslav Vlk Tial almenaŭ per ĉi tiu vojo mi deziras multe da sukceso al Via sesio kaj al tuta Via aktiveco celanta al unueco kaj kompreniĝo en periodo, kiam en la mondo la tuta homaro estas disigata per tiom da miskompreno.

Benas

+ Miloslav Vlk, Ĉefepiskopo de Prago

Kaj dum la Seminario mem, post sia beno "*Urbi et orbi*" la **Papo** diris ankaŭ en esperanto : "*Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta !*" (Vidu sur p.5)

Kredo kaj scienco : la "Centre Copernic"

(Intervjuo kun P-o **Theo van Ruyskensvelde** ĉe la *Centro Koperniko* en Wezembeek-Oppem, apud Bruselo*)

– *Kio kondukis vin al tiu laboro kiu konkretiĝis en la "Centro Koperniko" ?*

(...) Mia starpunkto ĉe la Seminario povus esprimiĝi jene : kiel vivi sian kredon en mondo stampita de la sciencoj kaj teknikoj ? Aŭ ankoraŭ jene : kiel anonci Jesuo-Kriston al la sciencistoj. Dum tiuj jaroj ĉe la Seminario, mi multe ŝuldis al **Friedrich Dessauer**, germana verkisto, kiu estis por mi revelacio. Mi legis plurajn el liaj libroj kaj mi havis la okazon renkonti lin en Frankfurto. Mi memoras longan interparoladon, neforgeseblan : li diris al mi kiom gravas ke pastroj interesiĝu pri sciencoj (...) Li diris al mi la gravecon de baza scienca kleriĝo, ne por la esplorado sed por iom kompreni la celojn kaj riskojn de la scienca esplorado kaj pere de tio la situaciojn kaj problemojn de la sciencistoj (...)

Alia renkonto estis decidiga sur mia vojo : mi estis akceptita ĉe la *Maison Saint-Jean* [Domo Sta-Johano] en Heverlee (Lovenjo), de gesinjoroj Morren. S-ino Morren malkovrigis al mi aktivan kaj profundan ekumenismon (...)

Mi plenumis la deziron esprimitan de F. Dessauer : iniciĝo al fiziko kaj kemio ĉe UCL [Lovenjo Katolika Universitato], kaj cetere iniciĝo al biologio.

Kiam temis pri mia nomumado, la ekleziaj respondeculoj ne bone vidis kie lokigi min... Mi instruis fizikon en la supera duagrada ciklo** ĉe Kolegio *Johano-la-XXIII-a* (en Wolwe) (...)

– *Kiuj estis la ĵusaj "antecedentoj", se oni povas tiel diri, preparaj al la kreo de la Centro Koperniko ?*

En 1973 oni devis denove nomumi min. La Kardinalo **Suenens** konfidis al mi la taskon de "*paŝtista misio en scienca kaj teknika medio*" (...)

Mi havis rilatojn kun multaj homoj. Mi restis membro de la "*Libera Ekzameno*". Ankoraŭ hodiaŭ mi ne vidas gravajn malfacilaĵojn por subskribi la manifeston de la *Libera Ekzameno*, almenaŭ en tia mezuro ke ni devas akcepti nur tion pri kio ni ekkonsciis. La blinda "*fido de la karbovendisto*" ne estas, laŭ mi, la kristana fido. La Kredo estas projekto kiun oni devas kiel eble plej multe plenumi en sia VIVO.

Iam, profesoro esprimis la deziron paroli pri la libro "*La hazardo kaj la neceseco*" (1970) de **J. Monod** kadre de kurso pri moralo. Ni tiam kompilis krestomation, sekvitan de multaj aliaj, el la verkaroj de **Teilhard de Chardin**, **Heisenberg**, **Einstein** ktp.

Venis la demando pri la nomo. Oni ĵus kreis en Louvain-la-Neuve (Lovenjo) la Centron *Galilée*. Mi elektis Kopernikon, tre trankvilan, ekstreme prudentan kanonikon, kiu parolis laŭ la us-modo : *ŝajnas ke, laŭŝajne, ĉio en la proceso disvolviĝas kvazaŭ...* Tio bone kongruis kun mia temperamento (...) Ni elektis kiel subtitolon "*Sciencoj kaj socio*".

– *Ĉu vi povas diri pli al ni pri la elekto de la subtitolo "Sciencoj kaj socio" ?*

Kompreneble estas efikoj de la sciencoj kaj teknikoj sur la vivon en socio, same sur la kampo religia kiel sur la kampoj socia, ekonomia, politika kaj kultura. Sed ankoraŭ la malo veras : la civitanoj havas sian opinion diredan pri faritaj esploradoj, pri la teknikaj elektoj (ekzemple atomcentraloj). (...)

– *Sed la rilato kun la kredo ?*

Ĝis 1960-65, la granda demando estis : ĉu estas akordebleco inter Kredo kaj Scienco ? (...) Ekde 1968 (...) estas translokiĝo de la problemaro, al la scienca kaj teknika *praktiko* (...)

La divido ne plu estas inter kredantoj kaj nekredantoj sed inter tiuj kiuj estas atentemaj pri etiko kaj praktiko en sciencoj kaj teknikoj, kaj tiuj kiuj ne interesiĝas pri tio. De tio la partopreno en esploradoj, flanko ĉe flanko, de kredantoj kaj nekredantoj. (...) Tio estas samtempe interese kaj malfacila.

Estas interefikoj inter la sciencaj kaj teknikaj malkovroj kaj la teologia kampo. Ne estas nur la bioetikaj problemoj (...) Mi referencas la libron de **Reeves** : "*Pacienca en la lazuro*". Mi pensas pri esploradoj en paleontologio kiuj levas verajn problemojn (...) La teologio pri la kreado meritis esti reviziata, repripensata (...)

– *Kion signifas por vi la realo ?*

(...) Oni travivis epokon dum kiu oni demandis : kion kroman la kredo alportas ? La kredo ne alportas ion ; ĝi transformas la realon aŭ pli ekzakte ĝi vidigas la realon tia kia ĝi estas. Mi pensas pri tiu libro de **G. Habra** : "*La transfiguriĝo laŭ la grekaj Patroj*". Oni povas legi en ĝi ke sur la Monto Tabor eble ne la Kristo estis transfigurata sed la apostoloj. Ili vidis la realon tia kia ĝi estas. Tio estis por mi revelacio en tia mezuro ke mi ne devas ion aldoni al la realo, mi nur devas pliprofundigi ĝin tian kia ĝi estas. Dio ĉeestas en ĝi, la Sankta Spirito estas laboranta en ĝi ; tio cetere estas tre biblieca.

Tio donas al ni, ankoraŭ ĵuse diris al mi sciencistoj, *tute alian bildon de kristanismo*.


La kredo alimaniere vidigas al mi ĉion kion mi faras, ĉe mian sciencon laboron. (...)

Evidente, multaj kristanoj dezirus pripensi kiel kredantoj pri la sciencoj. Sed aliflanke estas "analfabeteco", manko da kulturo, same religia kaj teologia kiel scienca kaj teknika. Mi deziresprimas ke la ŝafistaj agentoj akiru minimumon da scienca kleriĝo !

El *Libre Pensée Chrétienne* [Libera Kristana Penso : 101 rue de Renaix, B-7890 Ellezelles, Belgio], n-ro 28 (nov. 93), p.6-8.
* Adreso : 77 avenue Maurice César, B-1970 Wezembeek-Oppem, Belgio. (Tel (02) 731 45 14).

** T.e., en la tiama Belgio, la tri lastaj jaroj antaŭ la abiturientiĝo.

Antaŭ 750 jaroj : fino de Montségur



La [franca] reĝa krucmilito [1226-28] alvenigis al **Montségur** ĉiujn senposedigitajn parencojn de Raimon de Péreille, kies patrino kaj bopatrino, kataristaj "perfektulinoj", jam estis en Montségur, kune kun kelkaj membroj de la hierarkio (...)

En 1232 Guilhabert de Castres, katarista episkopo de Tuluzio* ankoraŭ restadis, sekrete, en Fanjeaux [Fanĵo] (...). Unu tagon li petis la kavalirojn de Fanjeaux, eskorti lin kaj liajn kunulojn, kaj tiel foriris al Montségur kun sia [spirita] "*plenkreska Filo*"**, Bernard de Lamothe, la episkopo de Aĝenio***, Tento, la diakono Vigouroux de la Bacone kaj trideko da perfektuloj (...)

Montségur fariĝis la sidejo de la katarista Eklezio, stranga vilaĝo de kies enloĝantaro duono estis religiula kaj la alia duono konsistis el nobelaj familioj kaj soldatoj; vilaĝo sen kamparanoj (...). Ĉirkaŭ 200 perfektuloj kaj perfektulinoj tie vivis en [sekse apartaj] komunumoj ĉirkaŭ la hierarkio (...). Ĉiuj manlaboris, disponigante al la vilaĝo vestaĵojn kaj aliajn malgravajn utilajn aĵojn; unu perfektulo ĉe la muelejo kaj unu perfektulino ĉe la bakujo faris la panon por ĉiuj (...)

La vilaĝo ankaŭ akceptis konstantan alfluadon de pilgrimantoj el kiuj iuj (...) restadis nur kelkajn tagojn sed aliaj praktikadis verajn spiritajn retiriĝojn plurmonatajn (...). Kelkaj, malsanaj, venis nur por morti, trovi bonan finon en la manoj de la perfektuloj. Oni konas, per depozicioj faritaj antaŭ la Inkvizicio, la nomon de pli ol 1.000 homoj kiuj tiel venis kiel pilgrimantoj al Montségur inter 1232 kaj 1242 (...)

En 1241 Raimon Agulher, la episkopo de Razes, siavice alvenas ekloĝi en Montségur (...). La Grafo de Tuluzo devis, en 1241, (...) ĵuri "*faligi la kastelon de Montségur*"; li ludis parodion de sieĝo, dum kiu estis interŝanĝataj pli da politikaj kaj religiaj interparoloj ol da batoj. Tiel ke (...) la franca reĝa potenco prenis sur sin mem la taskon "*senkapigi la hidron*" (...)

Pli ol 1.500 homoj unuflanke, bone ekipitaj sed ne ĉiam entuziasmaj, dissemataj en maldensaj linioj aŭ malgrandaj postenoj ĉirkaŭ granda monto sur kies pinto malgrandan vilaĝon de 400 aŭ 500 enloĝantoj inkluzive de virinoj, infanoj kaj ĉefe maljunuloj, gardis garnizonon de iomete pli ol 70 deciditaj batalantoj: paradokse, malgraŭ la malegaleco de la reciproke frontantaj fortoj, tia sieĝo povintus daŭri longege (...)

[Post pluraj longaj vintraj monatoj] Pierre-Roger de Mirepoix [Mirpŭa] komencis traktadojn kun la seneskallo [Hugo] des Arcies por eviti la plej malbonan en Montségur, t.e. la finan sturmon kaj ĝeneralan amasbuĉadon (...). Pierre-Roger sukcesis konsentigi ke la vivo de la laikoj estos savita, kaj ankaŭ ke la senĉeestaj kondamnoj kiuj pendis super la plejparto de ili estas nuligitaj (...) 15-taga militpaŭzo estis konsentita kontraŭ livero de ostaĝoj (...)

De la 2-a ĝis 16-a de marto 1244 Montségur havis du semajnojn por trovi sin, sin reordigi, prepari sin en la reveninta silento. La perfektuloj, kiuj estis mortontaj, disdonis ĉiujn siajn havaĵojn kaj sian personan monon al la laikoj kiuj tiel longe defendis ilin (...)

La dimanĉon 13-an de marto, dudeko da gekredantoj petis la ricevon de la konsolo por sekvi la perfektulojn ĝis la lastega pordo, por esti inter ili.

Ĉu ago de malespero de viroj kaj virinoj kiuj ne plu havis ion perdeblan, aŭ ne volis postvivi la malaperon de karuloj? Sed Guillaum Aicart lasis sian edzinon kaj siajn tri infanojn, Corba de Péreille tutan familion.

Aŭ ĉu ne ago de fido de viroj kaj virinoj suprentiritaj per sia longa kaj intima kontakto kun la Bonaj Kristanoj kaj ĉiutage nutritaj per la spirita pano de la Parolo de Kristo, vokanta al la "*Regno kiu ne estas de tiu ĉi mondo*"? Eĉ batalantoj elektis la vojon de la ŝtiparo (...) kaj ankaŭ humilaj paroj (...) Kun Corba de Péreille, ŝia plej juna filino, needziĝinta, Esclarmonde. Ambaŭ tiel kunigis sin kun la maljuna Marquésia Hunaud de Lanta, sia patrino kaj avino: la sinjora familio de Montségur donis tri generaciojn al la ŝtiparo. Tio estis la episkopoj Bertrand Marty kaj Raimon Agulher kiuj celebris tiujn lastegajn ordinadojn (...)

Montségur ne havas aliajn sekretojn ol tiun fidan kaj koran agon de la lasta tago. Tiu ago de homo kiu elektas, devas forbalai la falsajn misterojn kiuj makuligas la simplan kaj krudan historion de Montségur, loko de vivo antaŭ ol esti loko de morto.

La merkredon 16-an de marto matene, la seneskallo de la franca reĝo kaj la ĉefepiskopo de Narbonne evakuigis la kastelon post la fina kapitulacio (...). La perfektuloj estis kuniĝintaj en la turnirejo [?]. Oni krude ekkaptis ilin, oni ligis ilin per ledaj ligiloj (...)

"*La sieĝitoj kiuj havis ripozon nek tage nek nokte kaj ne plu povis, tiuj malfideluloj, kontraŭstari la sturmojn de la soldatoj de la Kredo, akceptis la vivon savita kaj forlasis al la sieĝintoj la kastelon kaj la [religi-]vestitajn herezulojn kiuj, viroj kaj virinoj kune, estis trovataj je nombro de ĉirkaŭ 200. Inter ili estis Bertrand Marty, kiun ili estis farintaj sia episkopo. Rifuzinte konvertiĝi kiel oni estis invitinta ilin al tio, ili estis bruligataj en ĉirkaŭbaritejo de palisoj kaj fostoj kiun oni ekfajrigis.*"

Ĉiuj fontoj kongruas kun la kroniko de Guillaume de Puylaurens por taksu inter 200 kaj 225 la nombron de la viktimoj. El la inkviziciaj dokumentoj oni povas ĉerpi, rekte aŭ nerekte, la nomon de 60 el ili (...)

Se la Eklezio ne plu disponis sekuran ŝirmejon post la falo de Montségur (...) ĝi ankoraŭ nombris relative gravan kvanton da predikistoj dissemataj en la sekretejo de la kamparoj, kaj kiuj periode revivigis sin per la kontakto kun la kataroj de Italio. Tiu Eklezio de la dezerto ankriĝis en la kaŝiteco, el kiu la Inkvizicio bezonis ankoraŭ 75 jarojn por elradikigi ĝin.

Anne Brenon

El *Le vrai visage du catharisme*, eld Loubatières, 1991, p.253-264.


* *Le Toulousain*, okcitana regiono ĉirkaŭ Tuluzo (*Tolosa/Toulouse*).

** T.e. lia estonta posteulo kiel episkopo.

*** *Agenais*: regiono ĉirkaŭ Agen (Aĝeno).

Katarisma ritaro (fino)

La katarisma ritaro estas kopiita rekte post Nova Testamento ankaŭ en la okcitana (kiu konsistas el la 4 evangelioj, Agoj de Apotoloj kaj la kanonaj epistoloj). Sur la 236-a paĝo oni povas legi, antaŭ la komenco de la ritaro, parton el la johana Prologo en la latina. (Precize Jhn 1,13-17 : "...neque ex uoluntate uiri sed ex deo nati sunt. Et uerbum caro factum est. Et abitauit in nobis. & uidimus gloriam eius, gloriam quasi unigenit a patre (...) "



La manuskripto probable datiĝas el le dua duono de la XIII-a jc kaj oni povas atribui ĝin, dank'al la lingvaĵo, al la sudo de la grafejo de Foix aŭ de la tiama vicgrafejo de Carcassonne. Ĝi estas konservita ĉe la *Palais des arts* en Lyon. Ekzistas nur unu alia kompleta katarisma ritaro, en la latina (konservata en Florenco), plus unu longa fragmento de ritaro en la provenca, nomita la *Duobla ritaro* pro ĝia nuntempa konservejo en Irlando.

(Foto de la urba biblioteko)

(Notoj de la sekva paĝo)

1/ Duobla serio da "Patro nia", eble du dekoj* ? Eble oni uzis por tio ian "rozarion" kiun oni tenis, tial la verbo ? (*kaj ne nur du, kiel same la seso verŝajne NE estis do ses "Patro nia", sed ses serioj do 60 !)

2/T.e. al kiu ili povos redoni ĝin.

3/ Vidu la unuan noton.

4/ Oni ne devas konfuzi tiun ĉi *venia* (jam priskribita en n-ro 13 p.13 noto 10) kun la *melioramentum*. Pri tiu-ĉi, oni scias pri kio precize temas dank'al priskribo de Brune, vidvino de G. Pourcel, de Montailou, kaj neleĝa filino de la perfektulo Prades Tavernier (...), rakontanta kiel (...) ŝi renkontis sian patron — kiun ŝi ne multe konis — ĉ. la jaro 1300 :

"Kaj li tiam diris al Azalais, ke ŝi diru al mi ke mi faru al li la riverencon kiun kutime faras la kredantoj al la herezuloj, ke mi adoru lin kaj genuiĝu antaŭ li dirante : "Benu, Bona Kristano, preĝu por ni". Ĉar mi respondis ke mi ne scias fari tion, Azalais instruis al mi la manieron adori herezulojn, genuiĝante kaj metante la manojn surteren, kaj klinante la kapon al la manoj..."

(El *Anne Brenon*, "Le vrai visage du catharisme" 1991, p.214).

5/ Benu, pardonu nin, amen. Estu farita por ni laŭ via parolo. La patro kaj la filo kaj la sankta spirito pardonu al vi ĉiujn viajn pekojn. Ni adoru la patron kaj la filon kaj la sanktan spiriton. Kaj Patro sankta, akceptu cian servanton en cia justeco, kaj sendu cian gracon kaj cian sanktan spiriton sur lin.

nos em uengut denant deu, e denant uos, e denant la z-ordenament de sainta glisa p[er] recebre s[er]juisi, e p[er]do, e penedensia, de tuit li n[ost]ri peccat liq[u]al auem fait ni dig, ni pessatz, ni obratz del n[ost]re naissement ent[r]o fin a

ora, e q[u]erem m[isericord]a a deu, z-a uos que uos pr[e]guetz p[er] nos lo paire Sant de misericordia qu[...?] nos p[er]do.

Adorem deu e manifestem tuit ali n[ost]re peccat, e las n[ost]ras motas gréus ofensios, a z - esgardament del paire e del fil, e del onorat Sant esp[er]it e dels onoratz sants auangelis, e dels onoratz apostoli. Per la orazo e p[er] la fe e p[er] la saluatio de tuit li dig[ni]ters gl[or]iosses crestia[n]s, e dels bonauratz durmantz ancesors, e dels f[rat]res enauiro estant (...)

Diversaj reguloj pri la preĝo kaj la konduto havenda en iaj cirkonstancoj

La tasko "teni duon"¹ kaj diri la preĝon ne devas esti konfidata al sekulara homo.

Se la Kristanoj iras en danĝeran lokon ili preĝu Dion per "gratia". Kaj se oni vojaĝas sur ĉevalo, oni tenu duon. Kaj oni devas diri la preĝon enirante sur ŝipon aŭ en urbon, aŭ pasante sur tabulo aŭ sur danĝera ponto.

Se la kristanoj trovas homon kun kiu ili devas paroli dum ili preĝas Dion, se ili jam finis ok preĝojn, tiuj ĉi povas esti rigardataj kiel "simpla" kaj se ili diris dek-ses preĝojn, tiuj ĉi povas esti rigardataj kiel "duo".

Kaj se ili trovas ion survoje, ili ne tuŝu ĝin se ili ne scias ke ili povos redoni ĝin. Sed se ili vidas ke homoj pasis antaŭ ili, al kiuj la aĵo povos esti redonata, ili prenu ĝin kaj ĝin redonu se ili povas. Kaj se ili ne povas, ili remetu ĝin en tiu loko. Kaj se ili trovas [mort?]-kaptitan beston aŭ birdon, ili ne zorgu pri ĝi.

Se la kristano volas trinki tage, li estu preĝinta Dion dufoje aŭ pli depost la manĝado. Se post la nokta "duo" ili trinkas, ili faru alian "duon". Se estas kredantoj, ili staru kiam ili diros la antaŭtrinkan preĝon.

Se kristano preĝas Dion kun kristaninoj, li gvidu la preĝon. Se kredanto, al kiu estis transdonita la preĝon, estas kun kristaninoj, li iru aliloken kaj li preĝu sola.

Se la kristanoj al kiuj la servo de la Eklezio estas konfidita ricevas mesaĝon de malsana kredanto, ili devas iri tien kaj ili devas konfidence demandi kiel li kondutis kontraŭ la Eklezio ekde kiam li ricevis la fidon, ĉu li ne havas ian ŝuldon al la Eklezio aŭ ian damaĝon pri kiu ĝi povus akuzi lin. Kaj se li ŝuldas ion kaj povas pagi ĝin, li devas tion fari. Se li ne volas fari tion, li ne devas esti akceptata. Ĉar, se oni preĝas Dion por falsa kaj mallojala homo, tiu preĝo ne povas profitigi. Tamen, se li ne povas pagi, li ne devas esti forpuŝata.

Kaj la kristanoj devas instrui lin pri la abstinenco kaj la kutimoj de la Eklezio. Poste ili devas demandi lin ĉu, kaze de lia akceptiteco li estas preta en sia koro, observi ilin. Kaj li ne devas promesi tion se li ne sentas sin profunde rezoluta pri ĝi. Ĉar sankta Johano diras ke la parto de la mensoguloj estos en fajra kaj sulfura lago [Apok. 21,8]. Se li diras ke li sentas sin sufiĉe firma por suferi ĉion ĉi (t.e. la abstinenco), kaj se la kristanoj konsentas akcepti lin, ili devas ŝarĝi lin per abstinenco laŭ jena maniero: ili devas demandi lin ĉu li estos firma en sia koro pri nemensogado, neĵurado; ĉu li scios gardi sin kontraŭ malobservado de la aliaj malpermesoj de Dio, kaj ĉu li sentas sin preta por observi la kutimojn de la Eklezio kaj la ordonojn de Dio, kaj por teni sian koron kaj siajn posedaĵojn, tiajn kiaj li ilin havas aŭ havos en la estonteco, je la laŭplaĉa dispono de Dio kaj de la Eklezio kaj je la servo de la gekristanoj, ĉiam, ekde nun, tiom kiom li povos. Se li diras jes, ili devas respondi: "Ni vin ŝarĝas per tiu abstinenco por ke vi ricevu ĝin de Dio kaj de ni kaj de la Eklezio, kaj por ke vi observu ĝin tiom longe kiom vi vivos; se vi bone observos ĝin, kun la aliaj sekvendaj preskriboj, ni havas la esperon ke via animo pro tio havos la [eternan] vivon."

Kaj li devas respondi: "Mi ricevas ĝin de Dio kaj de vi kaj de la Eklezio".

Poste ili devas demandi al li ĉu li volas ricevi la preĝon. Se li diras jes, ili vestigu lin per ĉemizo kaj pantalonon, se tio eblas, kaj ili igu lin sidi se li povas levi la manojn. Kaj ili metu tablotukon aŭ tukon antaŭ li sur la lito. Kaj sur tiun tukon ili metu la libron, kaj ili diru unufoje *Benedicite* kaj trifoje *Adoremus patrem et filium et spiritum sanctum*. La malsanulo devas preni la libron el la mano de la Maljunulo. Se li povas atendi, tiu kiu praktikas la [spiritan] servadon devas admoni lin kaj prediki al li kun konvenaj atestoj. Poste li devas demandi al li, pri la farita promeso, ĉu li havas la rezolutecon observi kaj teni ĝin kiel li diris. Kaj se li diras jes, ili [la kristanoj] igu lin konfirmi ĝin. Kaj poste ili devas legi al li la preĝon kaj li devas sekvi ĝin. La maljunulo tiam diros al li: "Jen la preĝo kiun Jesuo-Kristo alportis en tiun ĉi mondon, kaj li instruis ĝin al la "bonuloj". Ne manĝu nek trinku ion sen unue esti dirinta tiun preĝon. Kaj se vi fariĝus neglektema pri tio, vi devus pentofari pri ĝi." Kaj li devas diri: "Mi ricevas ĝin de Dio, de vi kaj de la Eklezio". Tiam ili devas saluti lin kiel oni adiaŭas virinon. Kaj poste ili devas preĝi Dion per "duo"³ kaj *veniae*, kaj remeti la libron antaŭ lin. La malsanulo devas trifoje diri: "Adoremus patrem et filium et spiritum sanctum". Poste li prenos la libron el la mano de la maljunulo kaj la maljunulo admonos lin kun atestoj kaj kun tiaj paroloj kiuj konvenas al *Konsolo*. La maljunulo devas demandi al li ĉu li havas en la koro la intencon teni kaj observi sian promeson, tia kia li faris ĝin, kaj li igos lin konfirmi ĝin.

Poste la maljunulo devas preni la libron kaj la malsanulo kliniĝi kaj diri: "Parcite nobis. Pri ĉiuj pekoj kiujn mi age aŭ dire aŭ pense faris mi petas pardonon de Dio, de la Eklezio kaj de vi ĉiuj." La kristanoj devas diri: "De dio kaj de ni kaj de la Eklezio ili estu pardonitaj al vi, kaj ni preĝas al Dio ke li pardonu ilin al vi". Tiam ili devas konsoli lin metante la manojn kaj la libron sur lian kapon, kaj trifoje diri: "Benedicite parcite nobis, amen; fiat nobis secundum verbum tuum. Pater et filius et spiritus parcat vobis omnia peccata vestra. Adoremus patrem et filium et spiritum sanctum", kaj poste: "Pater sancte, suscipe servum tuum in tua justitia, et mitte gratiam tuam et spiritum sanctum tuum super eum". Kaj se temas pri virino, ili devas diri: "Pater sancte, suscipe ancillam tuam in tua justitia, et mitte gratiam tuam et spiritum sanctum tuum super eam". Kaj poste ili preĝu al Dio per la preĝo, kaj ili devas mallaŭte diri la seson. Kaj kiam la seso estos dirita, ili devas trifoje diri: "Adoremus patrem et filium et spiritum sanctum" kaj unufoje la preĝon laŭte. Kaj poste ili salutu lin kiel viron. Poste ili devas fari la pacon [kisi unu la aliajn] inter si kaj kun la libro. Kaj se estas kredantoj aŭ kredantinoj ili faru la pacon, kaj la kristanoj devas peti la saluton kaj reciproki ĝin.

Se la malsanulo mortas kaj lasas al ili aŭ donas al ili ion, ili ne devas reteni ĝin por si nek proprigi ĝin al si, sed ili devas deponi ĝin je la dispono de la Ordeno. Se la malsanulo pluvidas, la kristanoj devas prezenti lin al la ordeno kaj preĝi por ke li igu sin denove konsoli, tiel frue kiel li povas, sed li, li sekvu, pri tio, sian volon.

Kantoj de espero kaj de libereco

" Al vi ĉiuj , ekstere , kiuj faris ĉion kion vi povis por ni en prizono, ni estas ege dankemaj, kaj ni neniam forgesos vin. Mi do donacas al vi kanton."

14 budhistaj monaĥinoj malliberigitaj en Tibeto ricevis 9-jaran krompunon pro komponado en sia prizono de kanto favora al la Dalai-Lamao.*

Jen traduko de franclingva teksto (laŭtlejta de la kantisto Yves Du-teil), kiu akompanas tiujn kantojn, nun haveblajn en sonkasedo** :

Iliaj kantoj estis surbendigitaj (...) dank'al magnetofono sekrete enportita en unu el la plej teruraj malliberejoj en Lhasao, la fifama prizono Drapĉhi*** (...) Ili estas kantitaj de monaĥinoj averaĝe 20-jaraj, novicoj aŭ votintoj en la monaĥinejoj Garu, Miĉhungri, Ĉhungseb. El tiuj votoj unu estas helpadi al ĉiuj estaĵoj, kaj fari tion konservante ĝojon kaj bonan humoron, laŭmodele de Drolma, enkarniĝo de la ĝoja kompato, protektantino de Tibeto.

Fariĝi monaĥino, tio estis do rezigni iom el la mondo por sin dediĉi al la tuta mondo. Liberaj, ili volis diri sian amon de la libereco kaj diri tion nome de sia popolo kiu ĉiam li-

Novaj arestadoj

13 arestadoj de budhistaj gemonaj okazis en la tri unuaj monatoj de 1994. Kvin gemonaj estis arestataj en Lhasao dum mallongaj manifestacioj, la 21-3-94 en Barkhor, la tibeta kvartalo de la urbo. La manifestaciantoj postulis la "liberecon por Tibeto", insistante pri la religia libereco (...) "La monaĥinoj kiuj manifestaciis ŝajnis 18- aŭ 19-jaraj" rakontas ĉeestinto kiu precizigas ke ili estas devenantaj de Phenpo Lhundrup, kampara regiono 60 km sude de Lhasao. Ili apartenas al la monaĥinejo Garu, kies pli ol 30 [eble 44] monaĥinoj jam estas malliberigitaj en Drapĉhi. Du junaj monaĥoj estis arestataj la 27-4-94 pro flirtigo de (malpermesata) tibeta flago. Kaj denove proksime de Kjimŝi kie 25 monaĥoj estis arestitaj komence de lasta somero [vidu *Asistilon* 14 p.20], estis kaptataj ok monaĥinoj apartenantaj al la monaĥinejo Ĉhobup en la valo Ĉhideŝol. (T.I.N./LT n-ro 21, apr. 94, p.3)



bere vivis laŭlonge de sia 20-jarcenta historio (...) Arestitaj dum ili mal-longe kaj pace manifestaciis surstrate, ili estis batitaj, perfortitaj kaj fine kondamnitaj al longa mallibereco.

Ribelaj, definitive ribelaj, ili, en sia ĉelo, komponis kantojn en kiuj oni parolas pri tempo kiam la suno denove brilos en la "Neĝa Lando", pri tempo kiam revenos "la juvelo de kompato", komprenu la Dalai-Lama.

Intervjuo kun la Dalai-Lamao en Bruselo (7-6-1994)

— Ĉu reveno al spiritaj valoroj ne estas nepre necesa ?

— Homo bezonas multe pli ol nutraĵo aŭ vestaĵoj. La uzo de materiaĵoj ne sufiĉas ; same, eduka sistemo kiu baziĝas nur sur la disvolvo de scio sen zorgo eduki la menson serĉi noblan konduton, estas bedaŭrinda. (...) La bezono remalkovri fortajn spiritajn valorojn ŝajnas al mi universala. Mi kredas ke la 21-a jarcento estos fundamentita sur tiaj valoroj.

— Oni konstatas pli malpli ĉie kaj ĉefe en la okcidentaj landoj ian fascinantecon por budhismo.

— Mi tute ne asertas ke budhismo estas la plej bona el la religioj. Ĉiu religio respondas al malsamaj aspiroj kaj mi volonte konceptas ke timo de Dio povas inspiri ies ĝustan konduton. Por tiuj kiuj preferas bazi sian konvinkon sur la racio, la budhista instruo ŝajnas pli kontentiga. Ĝenerale, mi kredas utile ke ekzistas diversaj filozofioj kaj religioj.

Neelteneblaj por la oreloj de iliaj turmentistoj, tiuj kantoj kostis al ili novan, sekretan, aperon antaŭ juĝistoj kaj kondamnon al duobla, kelkaj eĉ triobla puno.

Puntsok Njidron, 23-jara al 17 jaroj da mallibereco ; Tenzin Thubten, 20-jara, al 14 jaroj ; Ngaŭang Ĉhökji, 23-jara, al 13 jaroj ; Gjaltsen Drolkar, 19-jara, al 12 jaroj... Longa estas la listo de tiuj junulinoj, longa estas la daŭro de ilia puno.

Sed ili ne plendas. Ili kantas...

Ni aŭskultu ilin kun respekto, ili diras al ni popolon kiu rifuzas morti.

Kaj per niaj voĉoj ni eĉu ilian kuragon.

Ni parolu, ni kiuj povas tion, por ke ili estu liberaj. Ni agu por ke Tibeto vivu.

* *Lettre du Tibet* (LT) n-ro 19, feb. 1994.

** Ĉe CSPT, 2 rue d'Agneau, F-78580 Maule, Francio. (Faksnombro : (33-1) 30 90 88 25). 50 FF (plus sendokosto). La profito estas uzota por la tibetaj monaĥinoj, do oni tute rajtas doni pli, ĉu ne ? (Eble samtempe diru ke vi legis tiun anoncon en Asistilo, ke ili sciis ke esperanto servis utile al ilia afero. Dankon en ilia nomo kaj tiu de esperanto...)

*** Vidu en preskaŭ ĉiuj antaŭaj numeroj de Asistilo ! Sed ĉefe la *Alvokon al la Unuiĝintaj Nacioj* en n-ro 11, p.7 .

La religioj por starigo de vera paco

**Komuna deklaro post la interreligia renkontiĝo ,
okaze de la vojaĝo en Francio de la Dalai-Lamao ,
en Lourdes , la 15-an de novembro 1993**

Kion signifas nia renkontiĝo ?

Ĝi ne estas la frukto de ekumenismo, kiu igus pensi ke ekzistas inter ni ĉiuj unueco de fido, ebleco de komuna lingvo de preĝo. Ĝi ankaŭ ne estas la frukto de minimuma religia konsento, je reduktita kosto, por respondi al la sopiroj de tiom da homoj serĉantaj unuecon.

Ĝi respondas al la neceseco de reciproka kono kaj ŝato, en respekto kaj amikeco, kaj ankaŭ al nia komuna zorgo kontribui al starigo de paco kaj de solidareco en la mondo.

Per nia diverseco mem, ĝi forte proklamas, ke tia paco povos konstruiĝi nur kun agnosko, respekto kaj estimo unu de la aliaj, de ĉiu popolo, de ĉiu homo, kun ties diferenco. Kio efektive estas pli intima en la homa estaĵo ol lia alproksimiĝo al Dio, lia saĝeco, lia filozofio de ekzisto ?

Tial do ni rifuzas, ke la religioj povus ankoraŭ esti uzataj kiel ekranego, kiel ideologia vestaĵo de perforto, de milito. Kaj pro ĉiuj kulpoj, perfortoj aŭ militoj, kiujn oni faris en ilia nomo, ni petas pardonon.

Ni asertas kontraŭe, ke ili povas trovi en si mem, en la postuloj de vero, de justeco kaj de amo, kiuj inspiras ilin, la alvokon plej urĝan labori kune por starigo de paco vera kaj pli justa por ĉiuj.

Ankoraŭ pli, ni kredas ke ili ĉiam devas remalkovri la moralan urĝecon en la maniero propra al ili preĝi kaj praktiki. Ĉar por ni kredantoj, tio estas en la sincera praktiko de nia propra fido, ke renoviĝas la konsciencoj, ĉiam pli alten portantaj la komunajn spiritajn valorojn de respekto de la homaj rajtoj kaj de indeco de la homa persono.

Per nia komuna paŝo, ni volas rememorigi al mondo vundita de tiom da konfliktoj, da maljustecoj kaj malamo, la nepran neceson de reciproka respekto kaj de frajaj dialogoj, kaj kuniri, en la diverseco de niaj religiaj konvinkoj kaj de niaj preĝoj, kun la petkrioj kaj la klopodoj de milionoj da viroj kaj virinoj serĉantaj justecon, toleremon kaj pacon ĉie en la mondo.

S-ro Rektoro Dalil BOUBAKEUR, rektoro de la moskeo de Paris

Lia Dalai-Lamao Moŝto

M-ro Joseph Duval, prezidanto de la Franca Episkoparo

S-ro Granda Rabeno de Francio, Joseph Sitruk

Past. Jacques Stewart, prezidanto de la Franca Protestanta Federacio

Lia Moŝto Samdech Sang Bour Kry, Granda Patriarko de Kamboĝo

M-ro Jeremie, prezidanto de la interepiskopa komitato de la ortodoksa Eklezio en Francio

(Dokumento B.I.P. , trad. *Dia Regno*)

Reviviĝo en Rusio

Alveninte en Moskvon la 18-5-1994 por 4-taga vizito, la Dalai-Lamao renkontis la ortodoksan patriarkon Aleksis la II-a (...) Salutante la revigliĝon de intereso por budhismo kaj la restarigon de "*plurjarcentaj rilatoj kun Rusio*", la Dalai-Lamao anoncis la revenon en Rusion de cento da monaĥoj kalmuk- kaj buriat-devenaj, venintaj studi budhismon en Hindion, kaj kiuj de nun dediĉas sin al la renaskiĝo de la budhistaj komunumoj de Rusio.



Feliĉo
ne atingiĝas
per multo
da penado
kaj da volo
sed restadas
tie, tute
proksime,
en la mal-
streĉiĝo kaj
la rezigno.
Ne mal-
trankviliĝu,
nenio estas
farenda.
Ĉio kio
leviĝas en
la menso

havas nenian gravecon, havante nenian realecon.

Ne alligu vin al ĝi. Ne juĝu vin. Lasu la ludon ludi sole, leviĝi kaj malleviĝi, sen ion ŝanĝi, kaj ĉio malaperas kaj denove komenciĝas senĉese. Nur tiu serĉado de la feliĉo malebligas nin vidi ĝin.

Tio estas kiel ĉielarko post kiu oni kuras sen iam atingi ĝin. Ĉar ĝi ne ekzistas, ĝi ĉiam estis tie kaj akompanis vin ĉiumomente. Ne kredu je la realeco de spertoj, bonaj aŭ malbonaj ; ili estas kiel ĉielarkoj.

Volante kapti la nekapteblan, oni vane elĉerpiĝas.

Tuj kiam oni malstreĉas tiun alkroĉiĝon, la spaco estas tie, malfermita, gastigema kaj komforta.

Do ĝuu ĝin. Ĉio estas via, jam. Ne plu serĉu.

Ne iru serĉi en netrapasebla ĝangalo la elefanton kiu trankvile estas hejme.

Nenio farenda. Nenio perfortenda. Nenio volenda.

Kaj ĉio fariĝas per si mem.

Lamao Göndun Rinpoĉhe


Budhista somera universitato en Dhagpo Kagyu Ling (Francio)

5-jara stud-ciklo komenciĝas, de 15-7 ĝis 14-8-1994, kun trad. en franca, angla kaj germana. Ĝi ebligas akiri fundamentajn bazojn de filozofio kaj psikologio tiaj kiaj instruitaj de Budho kaj la majstroj estantaj liaj posteuloj.


Ĉi-somere la ĉef-instruistoj estas Khenpo Ĉhödrak Tenpal Rinpoĉhe kaj Togpa Rinpoĉhe, grandaj erudiciuloj el la Kagjupa linio, profesoroj ĉe la *Internacia Budhista Instituto Karmapa* (KIBI) en Nov-Delhio. La 14-7-94 ili donos publikan lecionon malfermitan al ĉiuj.

Kaj de la 30-7 ĝis 1-8-94, **vizito de lia Sankta Moŝto la 12-a Gjalüang Drukĉen**, spirita ĉefo de la Drugpa branĉo de la Kagjupa linio. Tiu branĉo originas el Lingĉen Re-pa (XII-a jc.). La nuna Gjalüang Drukĉen naskiĝis en hinda himalajo en 1963 kiel filo de lamao. Li estis rekonita de liaj Sanktaj Moŝtoj la XVI-a Karmapa kaj la XIV-a Dalai-Lamao, kiu surtronigis lin en 1967. Lia ĉefmonaĥejo estas apud Darĝiling (proksime de Sikimo).

La spirita direktoro de Dhagpo Kagju Ling estas lamao **Göndun Rinpoĉhe**, majstro pri meditado, kiu pasis pli ol 30 jaroj en plena soleco en Tibeto kaj Hindio.



C'est le livre de mesire lancelet du lac ou il lient sont
eteins tous les fins et les chieres du dit mesire lancelet
et la que du .s. gentil faire ple die mesire lancelet le roy
arnus galaor le lo chie et les signon de la table ronde



il qui se nait et uige au plus je
tir et au plus pecheur de tous
mande salur au commence
ment de ceste histoire a tous
ceulx qui le tuer ont et leur
arance en la sainte tunte est
ou pere et ou filz et ou saint
espeit. Du pere par qui toutes
choles sont establies et reconueit com menceement
de vie. Du filz par qui toutes choses sont delivres
des paines deust et remences a la joye poudurable.
Du saint espeit par qui toutes choses sont mises hors
des mains au maligue chere et remplies de joie par
leuluminement de lui est bien enlumineur et bien
confort. le nom de celui qui ceste histore fist cest une
nomme au commencement mais par les paroles qui

et apres se font dites jointes bien a grecevoir le nom
de lui et le pays dont il fu ne et vne grant partie de son
lignage. mais au commencement ne se veult pas del
conuier. Et si ya trois raisons pour quoy. la premier
est pour ce que sil se nommait et il deist que dieu lui
eust descouvert si haute histoire les seions et les en
meur le tenoient en bieuire. la seconde raison si est
pour ce que se on sauoit son nom tel le pourroit ou
nommer qui le cognoist si en puisoit moins l'histo
re pour ce que par tant petite personne eust este uise
en escript. la tierce raison si est que sil eust mis son
nom en histoire et on trouuast aucune chose de laue
nante par merce des mauvais escrivains qui apres
le tuncilant d'un liure en autre tout le blasme en
fust sur mo. Car on dist plus volentiers le mal q
le bien. Et plus est un homme blasme d'un seul mal
sil le fait qui ne seoit de cent biens. Et pour ces m
choles que vous auez oyes ne veule il une que son no
m soit du tout descouvert la soit ce qui se veulle conuier
le sein il plus conueit qui ne voudroit mais il d'na



La Serĉado de l' Sankta Gralo

Enkonduko

"*La Queste del Saint Graal*" * estis skribita ĉ. 1220 (kaj *erare* atribuita al Gautier Map). Ĝi estis verkita kiel sekvo de "*Lancelot*", ankaŭ atribuita al tiu sama aŭtoro (mortinta antaŭ 1210). Jen do la unua paĝo de manuskripto de "*Lancelot*" (sed jam en ortografie iomete pli moderna lingvo ol la vere origina versio), kiun ni deĉifras kaj tradukas : tiu komenco servu kiel enkonduketo al la sekva, pli spirita verko.

Cy commence le p[re]mier liure de mesire lancelot du lac

C est le liure de mess. lancelot du lac ou q[ue]l liure sont [con]tenus tous les fais et les ch[eua]ll[e]ries du dit mess. la[n]cel[ot] & la q[ue]ste du st graal faite p[ar] le dit mess. la[n]cel[ot] le roy artus galaot le bo[n] ch[eua]ll[er] & les [con]paignon de la table reonde

Cil qui se tient et iuge au plus petit et au plus pecheur de tous mande salut au commencement de ceste histoire a tous ceulx qui le[ur] cuer ont et leur creance en la sainte trinite cest ou pere et ou filz et ou saint esperit. Ou pere par qui toutes choses sont establiez et recoiuent commencement de vie. Ou filz par qui toutes choses sont deliureez des paines denfer et rameneez a la ioye pardurable. Ou saint esperit par qui toutes choses sont mises hors les mains au maligne esperit et raemplie de ioie par lenluminement de lui [qui] est vray enlumineur et vray confort.

le nom de cellui qui ceste histoire fist nest mie nomme au commencement mais par les paroles qui cy apres seront dittes pourres bien apperceuoir le nom de lui et le pays dont il fu ne et vne grant partie de son lignaige. mais au commencement ne se veult pas descourrir. Et si y a trois roisons pour quoy.

la premiere est pour ce que sil se nommait et il deist que dieu lui eust descouuerte si haulte histoire les felons et les enuieux le teuroient en vieulte.

la seconde raison si est pour ce que se on sauoit son nom tel le pourroit oïr nommer qui le cognistroit si en priseroit moins listoire pour ce que par tant petite personne eust este mise en escript.

la tierce raison si est que sil eust mis son nom en listoire et on trouuast aucune chose desauenante par nycete des mauuais escriuain qui apres la translatast dun liure en autre tout le blasme en fust sur moy. Car on dist plus volentiers le mal q[ue] le bien. Et plus est un homme blasme dun seul mal sil le fait quil ne seroit de cent biens. (...)

Ĉi tie komenciĝas la unua libro de l' Sinjoro Lancelot de la Lago

Tio estas la libro de l' Sinjoro Lancelot de la Lago, en kiu libro estas entenataj ĉiuj agoj kaj kavaliradoj de la supre nomita Sinjoro Lancelot, kaj la serĉado de la Sankta Gralo farita de la supre nomita Sinjoro Lancelot, la reĝo Artus, Galaot la bona kavaliro kaj la kompanoj je la Ronda Tablo.

Tiu, kiu sin konsideras kaj taksas kiel la plej malgrandan kaj la plej pekantan el ĉiuj, donas saluton ĉe la komenco de tiu historio al ĉiuj kiuj sian koron havas, kaj sian kredon, en la Sankta Triunuo, tio estas en la Patro kaj en la Filo kaj en la Sankta Spirito. En la Patro per kiu ĉiuj estaĵoj estas starigitaj kaj ricevas komencon de vivo. En la Filo per kiu ĉiuj estaĵoj estas liberigitaj de la inferaj suferoj kaj revenigitaj al la daŭrigebla ĝojo. En la Sankta Spirito per kiu ĉiuj estaĵoj estas elmetitaj ekster la manojn de la malbona spirito kaj replenigitaj per ĝojo, de la iluminigo de tiu [kiu] estas vera iluministo kaj vera kuraĝigo.

La nomo de tiu kiu ĉi-historion faris ne estas nomita ĉe la komenco sed per la paroloj kiuj ĉi-poste estos diritaj vi bone povos ekkoni la nomon de li kaj la landon el kiu li naskiĝis kaj grandan parton el lia familia deveno. Sed ĉe la komenco li ne volas sin malkaŝi. Kaj estas tri kialoj por tio.

La unua estas pro tio ke, se li nomus sin kaj li dirus ke Dio malkovris al li tiel altan historion, la perfiduloj kaj la enviuloj lin mortigus en fioco.

La dua kialo estas pro tio ke se oni sciis lian nomon, iu povus — ĉe lia nomado — kiu konus lin, malpli alte taksi la historion pro tio ke de tiel malgrava persono ĝi estis metita en skriba formo.

La tria kialo estas ke, se li metus sian nomon en la historion kaj oni trovus ion nekonvenan pro frivoleco de malbonaj skribistoj, kiuj poste ĝin transskribos de libro al alia, la tuta mallaŭdo estus sur mi. Ĉar oni pli volonte diras la malbonon ol la bonon. Kaj pli estas homo mallaŭdata pro ununura malbono se li faras ĝin, ol li estus [laŭdata] pro cent bonoj. (...)

* Nekonfuzenda kun "*La Rakonto pri la Gralo*" de Kristiano [Chrétien] de Troyes, verkita 40 jarojn pli frue (ĉ. 1182), kaj multe pli korteza.

Ĉi-apude, en la kvara bildo oni povas distingi la (oran) gralon portatan de du (fajro-ruĝaj) anĝeloj, super la kruco. La kavaliro estas "*Galaot*", aŭ Galado, la heroo de la mistika Serĉado.

I - La anonco de la *Sercado*

Averto

Ĉar mi tradukis rekte el la XIII-jarcenta originalo mi decidis, por redoni la lingvan arkaikecon, traduki ĝin ne al akademia esperanto sed al miksaĵo de laŭvorta traduko kaj de eroj el **zamenhofa** praesperanto*. Imagu ke jen antaŭ viaj okuloj estas malnova manuskripto ankoraŭ neniam deĉifrita ! Provu, kaj bonan kuraĝon ! (Jen almenaŭ du ŝlosiloj : *e* signifas *kaj* , kaj *kvan* signifas ne kvankam sed *kiam* ; same *nuk* ne rilatas kun nek sed signifas *nun*, el la latina *nunc*).

Se vi bezonas pliajn gvidilojn, vi povas rigardi la leksikoneton ĉe la fino, ĉerpitan el Rikardo Cash, "*Praesperanto : Lingvo Universala*" **. Sed anstataŭ tro cerbumi, **provu senhalte legi**, vi probable sukcesos diveni la plejparton.

La Queste del Saint Graal

[1,2]*** A la veille de la Pentecoste , quant li compaignon de la Table Reonde furent venu a Kamaalot et il orent oï le servise , et len vouloit metre les tables a hore de none (...)

[4,3] si regardèrent par les sieges de la Table Reonde et troverent en chascun leu escrit : *Ci doit seoir cil*. Et ainsi alerent tant qu'il vindrent au grant siege que len apeloit le Siege Perilleux. Et lors i troverent lettres qui i avoient novelement esté escrites, ce lor fu avis. Et il regardent les lettres qui dient : *.CCCC. anz et .LIIII. sont acompli emprés la Passion Jhesucrist ; et au jor de la Pentecouste doit cist sieges trover son mestre*. Et quant il voient ces lettres, si dient li uns a l'autre : "*Par foi, ci a merveilleuse aventure !*" (...)

[7,11] Quant il orent eu le premier mes, si lor avint si merveilleuse aventure que tuit li huis dou palés ou il mengoient et les fenestres clostrent par eles en tel maniere que nus n'i mist la main ; et neporquant la sale ne fu pas ennuble ; et de ceste chose furent esbahi et li fol et li sage. Et li rois Artuz, qui premiers parla, dist : "*Par Dieu, bel seignor, nos avons hui veues merveilles (...)* Mes je cuit que nos les verrons encore anuit greignors que ces ne sont."

Endementres que li rois parloit ainsi, si entra laienz uns preudons a une blanche robe, vielz et anciens ; mes il n'ot chevalier laienz qui seust par ou il i entra. Et li preudons venoit a pié et amenoit par la main un chevalier a unes armes vermeilles, sans espee et sans escu. Si dist si tost come il fu en mi le palés : "*Pes soit o vos*". Et après dist au roi la ou il le vit : "*Rois Artus, je t'ameign le Chevalier Desirré, celui qui est estraiz dou haut lignage le Roi David et del parenté Joseph d'Arimacie, celui par cui les merveilles de cest país et des estranges terres remaindront. Veez le ci*". Et li rois est molt liés de ceste novele ; si dist au preudome : "*Sire, bien soiez vos venuz se ceste parole est veraie, et bien soit li chevaliers venus ! Car se ce est cil que nos atendions a achever les aventures del Saint Graal, onques si grant joie ne fut fete d'ome come nos ferons de lui. Et qui que il soit, ou cil que vos dites ou autres, je voldroie que biens li venist, puis qu'il est si gentilz hom et de si haut lignage come vos dites*". — "*Par foi, fet li preudons, vos en verrez par tenz bel commencement*". (...)

[8,9] si li dist : "*Sivez moi, sire chevalier*". Et li si fet. Et il le moine tout droit au Siege Perilleus delez coi Lancelot se seoit, et souzlieve le drap de soie (...) si troeve les letres qui dient : *Ci est li sieges Galaad*. Et li preudons resgarde les letres, si les troeve novelement

La Sercado de l' Sankta Gralo

Je l'antaŭtago del Pentekosto, kvan la kompanoj je l' Ronda Tablo estis venintaj a Kamalot e ili estis odintaj la Deoservon e o volis metti la tablojn je l'horo de nono (...) tiam ili rigardis a l' seĝoj del Ronda Tablo e trovis sur ĉiu loko skribite : "*Ĉi (tie) devas sidi tiu*". E tiel al-lis ili ke ili avenis a l'granda seĝo kiun o nomis la Danĝera Seĝo. E tiam ili tie trovis literojn kiuj tie estis nove skribitaj, tio estis ilia opinio. E ili rigardas la literojn kiuj diras : "*.CCCC. annoj e .LIIII. pleniĝis post la Pasiono de Jesukristo ; e je l'tago del Pentekosto devas ĉi tiu seĝo trovi sian mastron*". E kvan ili vidas tiujn literojn, tiam ili diras la unu a l'alia : "*Je ma fido, ĉi (tie) estas mirinda aventuro !*" (...)

Kvan ili estis habintaj la unuan pladon, tiam ilin avenis tiel mirinda aventuro, ke ĉiuj la pordoj del palaco kie ili manĝis, e la fenestroj, fermiĝis per si mem laŭ tia maniero ke neniu tien mettis la manon ; e tamen la zalo ne estis enumba ; e de tiu afero estis mutigataj e la malsaĝaj e la saĝaj. E la reĝo Arturo, kiu unua parolis, diris : "*Je Deo, bellaj sinjoroj, no hodi vidis mirindaĵojn (...)* Sed mo kredas ke no vidos ĉinokte ankoraŭ pligrandajn ol tiuj estas."

Dume kvan la reĝo tiel parolis, tiam eniris tien noblomo kun blanka robo, maljuna e malnova ; sed ne estis kavaliro tie kiu sciis tra kie li eniris. E la noblomo venis piede e alkondukis per la mano kavaliro kun vermila blazono (...) Tiam li diris, tiom frue kvan li estis en la mezo del palaco : "*Paco estu al vo*". E poste li diris a l'reĝo tie kie li vidis lin : "*Reĝo Arturo, mo alkondukas al ci la Kavaliro Deziritan, tiun kiu estas deveninta el l'hota famillo del Reĝo Davido e el l'parencaro de Jozef el Arimateo, tiun per kiu la mirindaĵoj de ĉitii lando e del fremdaj regionoj haltos. Vidu lin ĉitie*". E la reĝo estas multe leta pro ĉitii novaĵo ; e li diris a l'noblomo : "*Sinjoro, bone estu vo veninta se ĉitii parolo estas vera e bone estu la kavaliro veninta ! Kor se tiu estas kiun ni atendis por fini la aventurojn del Sankta Gralo, iam ajn tia granda ĝojo ne estis farita pri homo, kian no faros pri li. E kiu ajn li estas, aŭ tiu kiun vo diras aŭ alia, mo volus ke bone li venu, sekve ke li estas tiel ĝentila homo e de tiel hota famillo kiel vo diras*". — "*Je ma fido, pondas la noblomo, de tio vo vidos je tempo bellan komencon*".

(...) tiam li diris : "*Sekvu min, sinjoro kavaliro*". E li tiel faras. E li lin kondukas tute rekte a l' Danĝera Seĝo apud kiu Lancelot sidas, e levas la tukon el silko (...); tiam troviĝas la literoj kiuj diras : "*Ĉi (tie) estas la seĝo de Galad*". E la noblomo rigardas la literojn ; tiam trovas ilin nove faritaj, tio estas lia opinio, e li konas la no-

fetes, ce li est avis, et il conoist le non ; si li dit si en haut que tuit cil de laienz l'oient : "Sire chevaliers, asez vos ci, car cist lex est vestres". Et cil s'asiet tout seurement et dit au preudom : "Sire, or vos en poez raler, car bien avez fait ce que len vos comanda. Et saluez moi toz cels dou saint hostel et mon oncle le roi Pellés et mon aiol le Riche Roi Pescheor, et lor dites de par moi que je les iré veoir au plus tost que je porrai et que je en aurai loisir." Et li preudons se part de laienz et comande le roi Artus a Dieu et toz les autres ausi (...)

[8,32] Quant cil de la sale virent seoir le chevalier ou siege que tant preudome avoient redouté, ou tantes granz adventures estoient ja avenues, si n'i a celui qui n'en ait grant merveille ; car il voient celui si jone home qu'il ne sevent dont tel grâce li puist estre venue, se ce n'est de la volenté Nostre Seignor. Et la feste comence granz par laienz : si font honor au chevalier et li un et li autre, car bien pensent que ce soit cil par cui les merveilles dou Saint Graal doivent faillir, et bien lou conoissent par l'esprueve del Siege, ou onques hom ne s'estoit assiz a cui il n'en fust mescheu en aucune maniere, ne mes a cestui. Si le servent et honorent de quant qu'il puent, come celui que il tienent a mestre et a seignor par desuz celz de la Table Reonde. (...)

[10,29] Quant li rois ot mengié et li compaignon de la Table Reonde, si se leverent de lor sieges. Et li rois meismes vint au Siege Perilleux et leva le drap de soie et trova le non Galaad, qu'il desirroito molt a savoir. Et il le mostre a mon seignor Gauvain et li dit : "Biax niez, or avons nos Galaad, le bon chevalier parfait que nos et cil de la Table Reonde avons tant desirré a veoir. Or pensons de lui honorer et servir tant come il sera avec nos ; car çaienz ne demorra il pas longuement, ce sai je bien, por la grant Queste dou Graal, qui prochienement comencera si come je croi (...)" — "Sire, fet messires Gauvain, et vos et nos le devons servir come celui que Diex nos a envoié por delivrer nostre país des granz merveilles et des estranges adventures qui tant sovent i sont avenues par si lonc tens."

Lors vient li rois a Galaad et li dist : "Sire, bien soiez vos venuz : molt vos avons desirré a veoir. Or vos avons çaienz, la Dieu merci et la vostre, qui i daignastes venir." — "Sire, fet il, je i sui venuz car je le devoie bien fere, por ce que de ceanz doivent movoir tuit cil qui seront compaignon de la Queste dou Saint Graal, qui par tens sera comenciee."

mon; tiam li diras tiel laüte ke çiuuj tiuj de tie odas lin: "Sinjoro kavaliro, sidiĝu çitie, kor çitiu loko estas via". E tiu sidiĝas tute sekure e diras a l' noblomo : "Sinjoro, nuk vo povas realli, kor vo bone faris kion o vin komandis. E salut u je mo çiuujn tiujn del sankta domo e man onklon la reĝo Pelles e man avon la Riça Reĝo Fiŝisto, e ilin diru de mo ke mo ilin iros vidi plej frue kiel mo potos e mo por tio habos tempon." E la noblomo foriras de tie e rekomendas la reĝon Arturo a Deo e os çiuujn la aliajn (...)

Kvan tiuj de la zalo vidis la kavaliron sidi ĉe l'seĝo kiun tiom da noblomoj timegis, kie tiaj grandaj aventuroj estis jam avenintaj, tiam ne estis tie iu kiu ne habis grandan miron pro tio ; kor ili vidas tiun tiel juna viro ke ili ne scias de kie tia graco potas esti a li veninta, se tio ne estas del volo de Nia Sinjoro. E la festo komenciĝas granda tie : tiam faras honoron a l'kavaliro e la unuj e la aliaj , kor ili bone pensas ke jen estas tiu per kiu la mirindaĵoj del Sankta Gralo devas cedi, e bone lin konas per l'provo del Seĝo, kie iam homo ne sidiĝis a kiu ne estis pro tio misŝanco en ia maniero, hor a çitiu. Tiam ili lin servas e honoras kiom ili potas, kiel tiun kiun ili tenas kiel majstron e sinjoron super tiuj je l'Ronda Tablo (...)

Kvan la reĝo estis manĝinta, e la kompanoj je l'Ronda Tablo, tiam ili sin levis de siaj seĝoj. E la reĝo mem venis a l'Danĝera Seĝo e levis la tukon el silko e trovis la nomon Galad, kiun li multe deziris scii. E li ĝin montras a ma sinjoro Gauven e lin diras : "Bella nevo, nuk habas no Galadon, la bonan perfektan kavaliron kiun no e tiuj je l'Ronda Tablo tiom deziris vidi. Nuk no pensu lin honori e servi tiom longe kiom li estas kun no; kor tie ne restos li longe , tion scias mo bone , pro la granda Serĉado del Gralo , kiu proksime komenciĝos kiel mo kredas (...)" — " Siro , pondas masinjoro Goven, e vo e no lin devas servi kiel tiun kiun Deo nin mittis por liberigi nian landon del grandaj mirindaĵoj e del strangaj aventuroj kiuj tiom ofte tie avenis de tiel longa tempo."

Tiam venis la reĝo a Galado : "Sinjoro, bone estu vo veninta : no multe vin deziris vidi. Nuk no vin habas çitie, per la Dea graco e la via, kiu tien degnis veni." — "Siro, pondas li, mo tien venis kor mo tion devas ja fari, pro tio ke de tie devas ekmoviĝi çiuuj kiuj estos kompanoj je l' Serĉado del Sankta Gralo, kiu je tempo komenciĝos."

a	al	kor	ĉar	nuk	nun
alli	iri	kordo	koro	o	oni
anno	jaro	kvan	kiam	odi	aŭdi
bella	bela	leta	ĝoja	os	ankaŭ
e	kaj	ma	mia	pondi	respondi
enumba	vd. ĉe umbo	metti	meti	poti	povi
Deo	Dio	metti la	meti sur tablo(j)n	realli	reiri
famillo	familio	tablojn	tukon kaj manĝilarojn	umbo	ombro
hor	krom se	mo	mi	verbo	vorto
hota	alta	mitti	sendi	vo	vi
		narri	rakonti	zalo	salono

* Neniun vorton mi mem elpensis krom "noblomo" anstataŭ nobla homo (romanike prud'homme, skribita en nia teksto preudom(e) aŭ eĉ preudon), kaj "vermilja" por traduki la francan (kaj anglan) vermeil, koloron kiun fakte mi malfacile konceptas : ĉu pli malpli simila al vermiljono ? aŭ ĉu pli orkolora ? Kaj kiel teoria pravigo mi referencas la bonegan artikolon de Eugene de Zilah, "Familiare", en La Gazeto n-ro 50 (31-aŭ de januaro 1994), p. 3-4 (F-55210 Creuë, Francio).

** Thaumiers : La Kancerklinikoteko, 1993, 31 p. (25 FF ĉe Jak Le Puil, Les Cocherats, F-18210 Thaumiers, Francio).

*** Ni tiel referencas la paĝon kaj linion de la eldono de Albert Pauphilet, Paris : Honore Champion, 1975.

Korea Won-Budhismo : reformita kredobjekto

(Won-budhista tradicio komenciĝis per la iluminiĝo de Pak Chungbin (1861-1943), kutime nomata Sot'aesan...)

En Won-budhismo la kredobjekto estas la Superega Vero de *Irūonsang* (desegnita figuro de cirklo) (...)

La Superega Vero, la kredobjekto, estas esprimita per la simbolo de cirklo. La simbolo liveras gravan ŝtupon al la vekigi al la Superega Vero. Etimologie en la korea *Ir* signifas *unu, maldu, malplura*; la termino *Ŭon* signifas *ronda, perfekta, cirklo* aŭ *perfekteco*.

Laŭ Sot'aesan, la formo de cirklo (*Irūonsang*) havas du rolojn kiuj igas la homojn atingi la veran *Irūon-on*.

Unue ĝi funkcias kiel signo. La formo de cirklo ne estas la vera *Irūon-o* mem kaj ne havas povon kiel la vera *Irūon-o*. La formo de cirklo aŭ *Irūonsang* povas esti komparata kun fingro kiu montras al la luno. Tiel Sot'aesan diras ke "*la Ŭonsang (la formo de Irūon) estas nura montrilo kiu indikas la realan Veron de Irūon-o*"¹.

(...) Kaj ĝuste kiel oni povas rememori siajn gepatrojn dank'al bidlo, oni povas ekkompreni la esencon, atributon kaj funkcion de *Irūon-o* pere de la formo de cirklo. (...)

La Vero de *Irūonsang* estas formulita per du karakterizaĵoj: ĝi estas senkomenca kaj senfina, kaj kaŭze interdependa. *Senkomenca kaj senfina* karakterizas la Veron en ni, dum *kaŭze interdependa* karakterizas la Veron ekster ni. Post la iluminiĝo Sot'aesan diris ke la Vero en ni, t.e. la vojo de nenaskiĝo kaj nemorto, kaj la Vero ekster ni, t.e. la principo de kaŭza kompensado, interpenetriĝas kaj kreas unu klaran formon (la formo de cirklo)². *Irūon-o* estas simboligita kiel unu tuto, totalo sen resto tial ke ne estas restaĵoj kiuj ne povas esti ampleksataj de la Vero de *Irūonsang*. (...)

La Vero de *Irūonsang* kiel kredobjekto estas esprimita kiel Budho-naturo aŭ mempovo. La Vero de *Irūonsang*, t.e. *Dharmakaja Budho*³, estas en ni. Baziĝante sur la kredo je *Dharmakaja Budho* oni povas malkovri kio estas en ni, t.e. la naturo de Budho, kaj atingi la *Budhecon*.

La kredo je *Irūonsang* rekte rilatas kun la praktiko de *Irūonsang* (...). La praktiko de *Irūonsang* estas vekigi sian propran menson kiu estas perfekta kaj senpartia kiel *Irūonsang*, kulturi sian menson por esti perfekta kaj senpartia kiel *Irūonsang*, kaj uzi sian menson perfekte kaj senpartie kiel *Irūonsang*.⁴

La Vero de *Irūonsang*, t.e. la *Dharmakaja Budho*³, estas ekster ni tute same kiel en ni. Baziĝante sur la kredo je la *Dharmakaja Budho* oni povas malkovri la *Budhecon* en la mondo ĉirkaŭ ni kaj interagi kun ĉiuj estaĵoj kiel Budhoj. La Skribo de Won-budhismo klarigas la karakterizaĵojn de la kredo je la Vero de *Irūonsang* - universala imanenteco - jene:

(...) *Ĉio kion ni vidas en la universo estas nenio alia ol Budhoj. Sekve, iam ajn kaj ie ajn ni devas esti tre respektemaj kaj atentemaj al ĉio kaj ĉiuj, gardante puran*

menson kaj pian sintenon kvazaŭ ni estus antaŭ la reala Budho. Vi ankaŭ devas provi praktiki oferan kultron al Budho rekte en ĉiuj aferoj en kiuj vi estas enmetitaj, tiel kreante beatecon kaj feliĉon en via reala vivo".⁵

Estas dirite ke la kredo je la Vero de la universala imanenteco de *Irūonsang* atingigas beatecon kaj feliĉon. Sot'aesan firme asertas ke oni ne devus serĉi beatecon en kultado de la bildoj de Budhoj sed serĉi beatecon rekte en ĉiuj aferoj en kiuj oni estas enmetita. La jena ekzemplo klarigas la amplekson de la Won-budhista kredo rilate la objekton de ties kredo:

Iam, kiam la Granda Majstro estis en la Bongnae-a Klostro, li aŭdis maljunulon kaj ties edzinon, kiuj eniris survoje al Silsang-a Templo, diri ke ilia bofilino havas tiel malbonan karakteron kaj tiom da malrespektemo ke ili iras fari oferon de kultado al Budho kun la celo ŝanĝi ŝin en bonkarakteran bofilinon. Aŭdinte tion, la Granda Majstro diris al ili: "Aŭskultu, ĉu vi ne scias ke fari oferon de kultado al la vivanta Budho estas pli efike ol fari oferon de kultado al la bildo de Budho?" Ili tiam diris: "Kie estas la vivanta Budho?" Li respondis: "Hejme. Via bofilino estas vivanta Budho." "Kial, ili miris, ŝi estas vivanta Budho?" La Granda Majstro tiam diris: "Estas tial ke via bofilino havas la kapablon oferi al vi filinan pietaton aŭ malrespekton. Provu oferi kultadon al via bofilino."⁶

(...) Sot'aesan proponas radikalan reformon de la tradicia simbolismo de la bildoj de Budho. Sot'aesan formulas sian radikalan reformon de tradicia simbolismo jene: la manifestiĝinta Budho (*Nirmanakaja Budho*), t.e. la bildo de Budho prezentanta liajn superajn fizikan formon kaj spiritajn karakterizaĵojn, estas anstataŭigita de la Vero-Budho (*Dharmakaja Budho*), prezentita per la nova simbolo "O" (la formo de cirklo)⁷. Kvankam Sot'aesan alte taksas la saĝecon kaj kapablon de la Budho kiel taŭga modelo por religiaj praktikoj, li ne konsentas kun la tradicia simbolismo: homa Budho kiel la objekto de kredo aŭ kulto.

Sot'aesan estas konvinkita pri la limigiteco de la tradicia simbolismo por la disvolviĝanta sofistika intelekto de la estonteco. Tial, li forigas kion li rigardas kiel la malvastan simbolon de la pasinteco, kaj esprimas sian reforman mesaĝon per nova kreiva simbolo. La reforma mesaĝo de Sot'aesan implicas ke la budhista tradicio rilate la kredobjekton, bezonas esti reformita por reĝustigi la instruojn de Budho en modernigita kunteksto.

Bokin Kim *

* El prelego farita de ŝi en Bangaloro, la 16-8-1993.

1/ The Scripture of Won Buddhism, tradukita de Pal-Khn Chon, Iri (Koreio): Won Buddhism Publishing Co, 1988, p.102.

2/ The Scripture... , p.81.

3/ La Budho en la formo de la Vero.

4/ Scripture, p.5-6.

5/ Scripture, p.100-101.

6/ Scripture p.108.

7/ Scripture p.105-106.

... kaj la plejnobla estas AMO

Jen fervora libro* "skribita rekte de la koro de adorantino"¹, Annemaria Marwaha, germandevena hinduino, plenplena de amo por sia spirita majstro Bhagavan Sri Satya Sai Baba. Kristanoj kaj multaj aliaj certe dubos ke li estas "Vera Dio"² (p.51), kaj hinduoj ke li estas Kriŝno³ (p.52); sed la libro estas kortuŝega ...almenaŭ por mi! (Kvankam la unuaj paĝoj ne multe logis min).

Edukite laŭ la principoj de "Kristana Scienco" kaj edziniĝinte al hindo ŝi malfermiĝis al toleremo ("perdisian rigidecon", p.40) kaj spirita vivo dank'al Sŭamio (hinda monaĥo) de la *Ramakriŝna Misio*. (Ne konfuzu kun la devotuloj de Kriŝno!) Ŝi poste vizitis "multajn konatajn kaj malpli konatajn sanktulojn" (p.39), el kiuj Anandamaji Ma.


Kaj komence de 1978 frapis ĉe ŝia pordo "maljuna fakiro" kiu nomis sin Phulŭala Baba (Flora Baba) sed kiun ŝi opinias esti Sai Baba, XIX-jarcenta sanktulo kies reenkarnejo la nuna "Sai Baba" estus. Li petis ke ĉiu esprimu sian deziron, promesante plenumi ĝin. Kiam li "ame kaj patrece" insistis pro ŝia rezisto, subite kortuŝita ŝi ekploris kaj fine diris: "Mi deziras vidi Dion" (p.45). - "Se vi vere deziras tion, vi certe havos".

En marto de la sama jaro ŝi renkontis la nunan Sai Baba, kaj malgraŭ lasta rezisteto ŝi "spertis grandegan ĝojon" kaj sentis "Lian Diecon" (p.51). "Ekde tiam, tiu ĝojo neniam lasis min".

La tuta resto de la libro estas **kvazaŭa taglibro de (spirita) amantino**. Ŝi rakontas ĉiun renkonton kun sia Guruo, sian amfrezan manieron interpreti la plej etan signon de li, kiu ĉiam respondis al ŝiaj silentaj demandoj kaj petoj; kaj eĉ, laŭ ŝi, ĉion aranĝis ankaŭ materie en ŝia vivo (subita laborebleco ĉe la germana ambasadejo, resanigoj, ktp.), kio cetere tute kongruas kun la sanskrita diraĵo ofte ripetata de Arnaud Desjardins, "sarvam guru-kripam": ĉio estas guru-graco!

Eĉ por hinda edzo tio fariĝis troa kiam de aŝramo de Sai Baba ŝi skribis al li ke ŝi ne revenos hejmen ĉar "kiam Dio vokas nin, ni devas obei": "Kelkaj atingas Dion post la disfalo de siaj korpoj; dume estas aliaj kiuj, kvankam vivantaj en siaj korpoj, atingas Dion. Sed la mondanoj rigardas ambaŭ kiel mortintajn". (p.171-172). Tion ŝi faris nur ĉar Sai Baba, kelkajn tagojn antaŭe, "ree kaj ree skuis la kapon" rigardante al ŝi. Al ŝia silenta demando pri la kialo, "la jena respondo leviĝis en [ŝia] menso: ĉi-foje vi ne reiras al via hejmo!" (p.167). Kaj ĉar ŝi "hazarde" aŭskultis amikindon diranta al alia "se subite vi mortos pro korinfarkto, aŭ iu alia malsano, ilia vivo irados, kaj certe ili travivos"; kio, ŝajnis al ŝi, celis al ŝi responde al la problemo ŝin turmentanta (p.169).

La edzo devis tuj aviadile veni mem de Delhio ĝis Hajderabado (pli ol 1.000 km!) por insistegi peti ke ŝia guruo resendu ŝin, pri kio la Sŭamio finfine bonvolis konsenti, tiel savante ilian familion (p.177-178): bonŝance ke "Sŭamio neniam deŝiras [tiele: t.e. disŝiras] familianojn; male Li kunligas ilin" (p.180)!



En sia amfrezeco ŝi eĉ estis songinta ke ŝia guruo, kiu tamen "estas Dio mem en korpa formo" vokis ŝin kaj rakontis al ŝi siajn problemojn, kaj ke ŝi "frapetis lian ŝultron, kaj certigis al Li jene: "Ne maltrankviliĝu!" kaj montrante la ĉielon (...) "Li ĉiam prizorgos!" (p.168).

Reenhejmiĝinte, ŝi mem konfesas ke ŝi "bezonis iom da tempo por renormaliĝi" (p.178), sed ĉiuj gajnis de tiu paroksisma sperto: "La infanoj, kiuj preskaŭ perdis sian patrinon, lernis taksu ŝian ĉeeston. La edzo eltrovis kiom li bezonis min" kaj ... "Mi mem komprenis kiom mi amas mian Guruon". Tamen ŝi ankaŭ "plie spertis ke cedo al Dio kaj tuta fido al Li neniam venigas nin en embarason, sed ke tiu cedo povas porti nin nur pli proksime al nia fonto" (p.180).

Oni devas aldoni ke jam kiam ŝi (portempe) vivis en la aŝramo aŭ en la ĉeesto de sia amata Dio, ŝi tamen konsciis ke ne lia "homa korpo" plej gravas, sed ke "ni loku Lin profunde en niajn korojn" (p.170); kaj ke se ŝi sentis meze de densa homamaso eĉ ekster plenplena templo: "ofte Sŭamio rigardis al mi, kaj per Lia mola Amo kiun Li dissendas, kvietigis miajn sopirojn", tio ne signifas ke li direktis sian amon nur al ŝi "sed ke Li dissendis tiun amon al ĉiuj, sed nur tiuj kiuj kapablas ricevi la subtilajn ondojn de amo, sentas, ĝuas kaj profitas..." (p.166-167).

Tiu duobla konscio probable savis ŝin de ordinara - patologia - frenezeco... Ĉiam ekstrema mistikismo, iam sur sia kuro al Dio, tanĝas deliron - se ĝi ne eniras ĝin! Kaj mi ne certegas ke la aŭtorino poste tute eliris ĝin... Eble ne gravas, se temas pri belega amfrezeco kiu ne plu malebligas ŝin plenumi siajn familiajn kaj profesiajn respondecojn. Tiel ŝi povas bele konkludi per la lasta linio de himno de sia infanaĝo: "La ĝojo kiun neniu povas forpreni estas la mia. Mi marŝas kun Amo hodiaŭ".

* Trad. de K.V. Nath, kompostita de Fonto, Chapecó (BR) kaj eld. en Rio de Janeiro, de Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1993, 185 p.

Lidia Zamenhof :

Kelkaj vortoj tamen pri la traduko, kiu ne estas tute kontentiga. Pli ol 80 "korektendoj" estas aldonitaj fine de la libro, sed mi timas ke preskaŭ sammultaj ankoraŭ mankas en la listo ! Mi donos nur kelkajn ekzemplojn :

Pri la rompo de antikva tradicio ke en ĉiu generacio unu fariĝu pastro, "tiam la pastra *ligilo* finiĝis en nia familio" : ĉu ne *linio* ? (p.21). "*Ĝangannath, la SIN-JORO de la Mondo*" (p.26), ĉu ne Ĝangannath (sanskrite: *jagad + natha*) ? *Regno Orissa* : kial ne *ŝtato* (de la hinda federacio) ? *Servado* (p.31), verŝajne pro la angla *service*, do : *diservo*. (Kaj mi ne ŝatas la neologismon *lante* kiam ekzistas pli kutima kaj samsenca *malrapide*.) Ne "*Prezidanto de la Mesio*" (p.38), sed de la *Misio* !

Kaj ŝajnas iom strange traduki Bhagavadgiton per *Ĉiela Kanto* kaj klasifiki kiel Puranon la Mahabharaton (p.36), sed pri tio probable respondecas ne la tradukanto sed la aŭtoro mem.

Kaj bedaŭrinde la fina poemo en postskribo estas tradukita per preskaŭ nur adasismoj, kio faras la tuton neĝuebla (aĵojn/mondaĵojn, tenu/detenu, Gardisto/Gvidisto, Dio/Dio, venis/devenis, diradas/asertadas, jaroj/jaroj, Li/vi, kiam/iam/ĉiam...)

Tamen kortuŝa libro, leginda ankaŭ de kiuj deziras ekscii pri la *bhakti* (kaj ne *bhakthi* : ĉi tie unu h estas tamen troa !), "*fervora amo al Dio*", kaj ties efiko sur virina koro, *ĉarme* frenezeca (almenaŭ se oni iam enamiĝis, eĉ se ne al Dio !)...

1/ Swami Ĉinmajananda, en la "Antaŭanonco", p.7 ,


2/ Multaj eksplicite parolas pri pseŭdogurao kaj trompaj prestidigitadoj erare rigarditaj kiel mirakloj. Mi mem ne vizitis lian aŝramon, kvankam ĝi estis proksima de Bangaloro, do ne povas taksi mem.

3/ Skribite Kriŝna de la tradukanto, kvankam la nomo estas en PIV kaj la prononco en Hindio mem ofte estas meze inter a kaj o, aŭ eĉ o ekzemple en Bengalo.

4/ Malgraŭ, laŭ la tradukanto kiu humile konfesas ke li ne pretendas esti bona reganto de la lingvo, tralegado, korektado kaj konsiloj de d-ro A. Goodheir, akademiano : ni do indulgu la hindan tradukanton.



Mesaĝo



Ci, kiel korpo, menso kaj spirito, estas sonĝo, sed kio reale ci estas, tio estas ekzistado, kono, beateco.

Ci estas la Dio de tiu ĉi universo. Ci estas kreanta la tutan universon kaj resorbanta ĝin. Por akiri la senliman universalan individuecon, la mizera malgranda individualeco-prizono devas foriri. Bhaktio ne estas plorado aŭ ia stataĉo. Tio estas vidi ĉion en ĉio kion ni vidas.

La celon atingas la koro. Sekvu la koron. Pura koro serĉas trans la intelekto. Ĝi fariĝas inspirata.

Kion ajn ni faras reagis sur nin. Se ni faras bonon, ni havos feliĉon kaj se malbonon, malfeliĉon. En ci estas la reala feliĉo, en ci estas la potenco oceano de dia nektaro. Serĉu ĝin en ci mem. Sentu ĝin, sentu ĝin, ĝi estas ĉi tie, la atmo. Ĝi ne estas la korpo, la menso, la intelekto, la cerbo. Ĝi ne estas la deziro de la deziranto. Ĝi ne estas la objekto de deziro. Trans ĉiuj ĉi, ci estas. Ĉiuj ĉi estas nur manifestiĝoj. Ci aperas kiel la ridetanta floro, kiel la brilanta stelo. Kio estas en la mondo, kiu povas igi cin ion deziri ?

Kun Benoj kaj Amo

Sri Sathya Sai Baba

* Sen-data Message, en *I 108 nomi del Signore...*, Sciolze (I), p.17.

Kiam Lidia naskiĝis en 1904, ŝiaj gefratoj jam estis preskaŭ plenkreskaj kaj la gepatroj ne plu junaj : la patrino estis 40-jara kaj la patro 44-jara. Kun la gefratoj ŝi ne povis multe interrilati, ĉar tiuj studis medicinon en Svislando, kaj ankaŭ poste ili ne ofte vidis unu la alian.

Ludoviko kaj lia edzino Klara vizitis ĉiun Universalan Kongreson kune, sed Lidia havis nenian emon lerni Esperanton. En 1909, kiam oni festis la 50-an datrevenon de la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof, multaj Esperantistoj estis kunvenintaj kaj faris gratulajn paroladojn. Lidia, tiam 5-jara knabineto, post ioma aŭskultado enĵetis : "*Pri kio tiuj homoj parolaĉas ? Mi komprenas eĉ ne unu vorton !*" kaj proteste forlasis la feston. (...)

En 1913 la Universala Kongreso de Esperanto estis okazonta en Berno, Svislando, kaj Lidia estis naŭjara, pro kio oni povis plani, ke ŝi kune kun la gepatroj vojaĝu al la kongreso, ankaŭ por renkonti siajn gefratojn, kiuj vivis en Svislando. Grandega problemo tamen estis, ke Lidia obstine ne volis lerni Esperanton kaj komprenis nur kelkajn vortojn. Tiam la patrino klarigis al ŝi, ke ŝi devos resti hejme, se ŝi ne lernos la lingvon, kaj tio finfine efikis. En nur ses semajnoj Lidia lernis tiom, ke ŝi povis interkomunikiĝi en Esperanto.

Ĉirkaŭ tiu tempo (...) aperis ankaŭ la unuaj artikoloj pri la baha religio en esperanto, tiel ke d-ro Zamenhof estis bone informita pri ĝi. Esperantistaj bahaanoj, kiel J. Esslemont kaj M. Root, aktive kontribuis al la disvastigo de esperanto, precipe Agnes Alexander en Japanio.

La sano de D-ro Zamenhof neniam estis stabila, li suferis pro kormalsano kaj mortis dum la Unua Mondmilito, la 14-an de aprilo 1917, kiam Lidia estis nur 13-jara. Tiutempe ŝi perfekte regis Esperanton kaj faris unuajn provojn traduki el la pola lingvo en Esperanton. Ŝia kuzo Stephen raportis, ke ŝi ĉiam estis okupita pri tradukado en Esperanton kaj ke ŝi estis konvinkita, ke ŝi devos daŭrigi la laboron de la tro frue mortinta patro, nome la disvastigon de la Internacia Lingvo.

En 1921, en la aĝo de 17 jaroj, Lidia finis siajn gimnaziajn studojn kaj estis akceptita de la Varsovia universitato kiel studento de juro.

En 1924, Lidia unuafoje publike elpaŝis en Universalan Kongreson okaze de kunsido de la Akademio de Esperanto kaj la Lingva Komitato, kiuj diskutis pri la evoluo de la lingvo kaj ties kontrolo.

En 1925 Lidia Zamenhof finis siajn studojn kaj ekhavis la akademian gradon de magistro pri juro. Tio tamen ne kondukis aŭtomate al iu profesio, des pli ĉar Lidia estis judino, kaj por judoj ŝtata ofico estis praktike neatingebla. Ŝi ankaŭ ne interesiĝis pri dommastrumado kaj neniam sentis emon al edziniĝo. Eĉ kuiru ŝi neniam lernis. Por ŝi estis klare, ke ŝi iel dediĉos sian vivon al la idealoj Zamenhofaj. Esperantujo estis ŝia hejmo.

Al la baha kredo

Dum la Ĝeneva Universala Kongreso de 1925 okazis fakkunveno de la Bahaaj Esperantistoj, al kiu Lidia estis invitita. Ŝi tute ne deziris tien iri, sed fine pro ĝentileco ŝi tamen partoprenis kaj konatiĝis kun A. Mühlischlegel kaj Martha Root, ambaŭ famaj Bahaanoj. Ankaŭ la fratino de Lidia, Sofia, partoprenis la aranĝon kaj legis artikolon de sia patro pri la neceso de universalaj religio.

La sekvantan jaron, [en aprilo] 1926, oni finfine inaŭguris la monumenton starigitan sur la tombo de d-ro Zamenhof en Varsovio. Ĉeestis Martha Root, kiu oficiale reprezentis la bahaan religion. Post la inaŭguro, vespere, okazis esperanta kunveno, en kiu sinjorino Root parolis pri *La Bahaaj Movadoj kiel formo de homaranismo*. Ŝi restis du semajnojn en Varsovio kaj dormis kun

Heroldino de homara unueco (1904-1944)

Lidia en sama ĉambro. Ili fariĝis bonaj amikinoj, kvankam Lidia ne volis akcepti la religiajn konvinkojn de Martha, des pli ĉar Lidia konsideris sin ateisto. Tamen, iom post iom ŝi konvinkiĝis pri la Bahaa Kredo kaj fine akceptis ĝin. Ni ne scias, kiam precize tio okazis, ĉar ekzistas nenia ceremonio, dum kiu oni publike deklaras sian kredon.

En 1926 Lidia partoprenis la bahaan kunvenon okaze de la Edinburga Kongreso ["*unufoje kiel kredantino*"] kun siaj gefratoj. Al tiu kunveno la fame konata sciencisto Auguste Forel, kies portreton hodiaŭ montras la mil-frankaj svisaj monbiletoj, sendis salut-telegramon: "*Longe vivu la universala religio de Baha'u'llah! Longe vivu la Internacia Lingvo Esperanto!*" (...)

En tiu tempo Lidia komencis instrui Esperanton en Varsovio kaj verki artikolojn por Pola Esperantisto, per kio ŝi gajnis iom da mono.

En 1928, okaze de du Bahaaj kunvenoj enkadre de la Universala Kongreso de Antverpeno, Lidia faris unufoje publikajn paroladojn, kaj tio sufiĉe mirigis la Esperantistojn, ĉar ĝis tiam ŝi neniam konsentis pri publika parolado kaj estis konsiderata kiel timema kaj retiriĝema persono. La cetera Zamenhofa familio neniel kontraŭis la konvertiĝon de Lidia al la bahaa kredo**, sed ili ankaŭ ne komprenis ĝin. En 1929 Lidia eĉ publikigis artikolon pri la bahaa religio en pollingva juda gazeto, kaj tio ŝokis la familion kaj multe pli la judan komunumon.

Tiutempe Lidia ektradukis *Baha'u'llah kaj la nova epoko* [de John Esslemont] en Esperanton, ĉe kio ankaŭ Martha Root kunhelpis. En 1930 Lidia vojaĝis al Hajfo en Palestino, sankta loko por la bahaanoj, kaj renkontis Shoghi Effendi, la tiaman gvidanton de la bahaa kredo.

Cseh-instruistino

Siatempe ŝi decidis lerni la Cseh-metodon por instrui Esperanton eksterlande. La Esperanto-Movado tamen ne plu estis tiel favora al Lidia kiel antaŭe, ĉar parte oni malŝatis ke membro de la Zamenhofa familio aktivis por la disvastigo de la Bahaa afero, timante ke la publiko ekkredus, ke la Esperantismo estas intime ligita al iu religia kredo.

En 1932 Lidia agadis por Esperanto en Svedujo, donante plurajn prelegojn kaj lecionojn pri Esperanto, parte antaŭ 250 homoj. Post tio ŝi ricevis inviton de la Esperanto-klubo en Lyon (Francio) por tie gvidi Cseh-metodajn kursojn. Kaj per tio komenciĝis la kariero de Lidia kiel Cseh-instruistino.

Kvankam la instruado de Esperanto en publikaj lernejoj estis malpermesita en tiam Francio, la intereso por Esperanto estis grandega. Lidia instruis al klasoj kun centoj da personoj, la gazetaro favore raportis kaj la lernantoj estis entuziasmaj. Tiuj sukcesoj estis reatingitaj en pluraj aliaj francaj regionoj.

Poste Lidia vizitis Nederlondon, sed unufoje ne partoprenis la Universalan Kongreson kiu — en 1933 — okazis en Kolonjo (Germanio) kaj jam estis regata de nazia influo. La prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (...) publike parolis en la Universala Kongreso la nazian politikon. Sur fotoj de tiu kongreso oni vidas ĉie la naziajn emblemojn kaj la germanajn esperantistojn, kiel ili levas la brakon por "*germana saluto*" (...)

En tiu tempo Lidia daŭrigis sian instruadon en Francio ĝis somero 1934, kiam ŝi reiris Varsovion post dujara foresto. Ŝi partoprenis la Stokholman UK kaj rekomencis sian esperanto-instruadon en Francio. Lidia estis tiel sukcesa, ke ŝi povis labori por la disvastigo de Esperanto dum pluraj jaroj en Francio kaj ŝi povis eĉ vivteni sin per tio.

La grandegaj sukcesoj de Lidia en Francio fine atingis interesitajn Esperantistajn rondojn en Usono, kiuj invitis ŝin doni Cseh-lecionojn tie. Sed unue Lidia vojaĝis en printempo 1937 denove al Francio por doni kursojn. En aŭgusto ŝi partoprenis la Universalan Kongreson de Vieno, kie en ties Internacia Konferenco de Virinoj ŝi faris paroladon kun la titolo *Al pli bona estonteco*, en kiu ŝi emfazis la gravegan rolon de la patrinoj en la kontraŭmilita edukado de siaj gefiloj. De Vieno ŝi revojaĝis al Varsovio, kie la situacio por judoj pli kaj pli akriĝis.

En septembro 1937 Lidia enŝipiĝis por Usono, kie oni atendis ŝin kun miksitaj sentoj, ĉar disvastiĝis onidiro, ke Lidia estas mizera retoro. Krom tio esperantistoj kaj bahaanoj devis kunlabore organizi ŝian vojaĝon kaj restadon. Ambaŭ grupoj estis ĵaluzaj pro Lidia, kaj la esperantistoj ne fidis la bahaanojn, ĉar tiuj ja parolis pri la neceso de universala lingvo, sed apenaŭ interesiĝis pri esperanto. Tio ŝanĝiĝis kiam Lidia eklaboris en Usono, sed la sukcesoj ne estis tiel triumfaj kiel en Francio. Ŝi instruis ekzemple en Novjorko, Filadelfio, Detroit, Ĉikago, Cleveland (Ohio), Minneapolis, Boston ktp. Por Lidia Usono estis tre fremda, surpriza mondo, kaj ŝi ne bonfartis tie kaj estis malfeliĉa.

La lastaj jaroj

En 1938 la politika situacio fariĝis pli kaj pli kriza, la pola registaro dekretis, ke polaj ŝtatanoj, kiuj ne revenos hejmen, perdos sian ŝtatanecon, kaj samtempe la restad-permeso de Lidia malvalidiĝis. Krom tio ŝi pro nescio malobeis al usona leĝo, kiu malpermesis al ŝi perlabori monon dum la restado, kaj ŝi estis akceptinta honorariojn, kvankam malgrandajn, por la Esperanto-lecionoj. Pro tio Lidia forlasis Usonon, la 29-an de novembro 1938, kaj vojaĝis hejmen.

Reveninte ŝi sin dediĉis denove al tradukado kaj verkado. Interalie ŝi tradukis *Baha'u'llah kaj la nova epoko* en la polan lingvon. Tiutempe ekzistis precize tri bahaanoj en Pollando, kaj ĉar ili apartenis al tri malsamaj naciecoj, ili interkomunikiĝis nur en esperanto.

En septembro 1939 eksplodis la mondmilito kaj Lidia havis la saman sorton kiel ĉiuj polaj judoj. Ŝi devis vivi en la varsovia geto, kie ŝi donis lecionojn pri angla lingvo por vivteni sin. La Esperantistoj ne forgesis Lidian kaj sendadis pakaĵojn al ŝi. Germana soldato, kiu estis Esperantisto, eĉ klopodis helpi al Lidia, ebligante al ŝi fuĝon, sed Lidia rifuzis.

En 1942 la nazioj komencis grandskalan ekstermadon de la judoj en Varsovio, kaj en aprilo 1943 la varsovia geto estis definitive „likvidita” de la nazioj. Oni supozas, ke tiam ankaŭ Lidia estis deportita al la koncentrejo Treblinka kaj mortigita tie kiel pli ol unu miliono da samsortanoj.

La mesaĝo de Lidia Zamenhof estis la unueco de la homaro, la interfratiĝo de la homoj, la emancipiĝo de la virinoj kaj batalo por paca mondo. Ĉio radikis en la homaranismo proklamita de ŝia patro kaj en la instruoj de la Bahaa Kredo. Per tio ŝi apartenas al la granda armeo de pacaj batalantoj, kiuj oferis siajn vivojn en la lukto por pli luma estonteco. Lidia Zamenhof, karmemora al Esperantistoj kaj al Bahaanoj, restos neforgesita.

Heinz Dieter Maas

* Laŭ ŝia "Nekrologo" "verkita de usonaj bahaanoj", publikigita en junio 1947 en "Bahaaj informoj: Por la anoj kaj amikoj de la Bahaa Afero", Genevo, n-ro 4, p.2 (Noto de la redaktoro)

** Tio ŝajnas ne tute kongrui kun ŝia frua "Nekrologo": "Post ŝia aliĝo al la Bahaa Kredo, maltrankvilaĵoj komenciĝis por Lidia. Kulpigita de kelkaj parencoj kiel "perfidantino" de la Hebrea religio, ŝi estis insultita kaj persekutita pro sia kredo (...)", sl. (Noto de la red.)

El la "LIBRO DE CERTECO"

(...) Estas ĉies devo serĉi klerigon pri la malfacilaĵoj de la Kredo kaj pri la malklaraj aludoj en la paroloj de la Tagiĝoj de Sankteco ĉe tiuj kies koroj estas lumigitaj, kaj ĉe la Trezorejoj de la diaj misteroj. Tiamaniere tiuj misteroj estos solvitaj ne per la helpo de akirita scienco, sed sole dank'al la subteno de Dio kaj verŝoj de Lia favoro. *"Demandu do tiujn, al kiuj konfidita estas la gardado de la Sanktaj Skribaĵoj, se vi ĝin ne scias."**

Sed, ho mia frato, kiam vera serĉanto decidis komenci la paŝojn de serĉado sur la vojo, kondukanta al la konado de la Pratemplulo, li devas, antaŭ ĉio, senmakuligi kaj purigi sian koron, kiu estas la loko de la malkaŝiĝo de la internaj misteroj de Dio, de la malheliga polvo de ĉia akirita sciado kaj de la sugestioj de la enkorpiĝoj de ŝatana fantazio. Li devas purigi de ĉia makulo sian bruston, kiu estas sanktejo de la eterna amo de la Amato, kaj sanktolevi sian animon super ĉion, kio rilatas al akvo kaj argilo, super ĉiajn ombrajn kaj efemerajn inklinojn de la koro. Li devas tiel purigi sian koron, ke restu tie nenia postsigno ĉu de amo aŭ de malamo, ke tiu amo ne instigu lin blinde al eraro, aŭ tiu malamo ne forpeli lin de la vero. Vi vidas en tiu ĉi tago, kiel plej multe da homoj, kaŭze de tia amo kaj malamo, restis sen la ekvido de la senmorta Vizaĝo, flankiĝis for de la Enkorpiĝoj de la diaj misteroj, kaj sen-gvide vagas tra la sovaĝejo de forgeso kaj eraro. La serĉanto devas konfidi sin ĉiam al Dio, li devas forlasi la popolojn de la tero, malligi sian koron de la mondo de polvo kaj alligi ĝin al Tiu, kiu estas la Sinjoro de Sinjoroj. Li devas neniam klopodi altigi sin super iun ajn, li devas forlavi de la tabuleto de sia koro ĉian postsignon de malhumileco kaj vanteco, li devas iri la vojon de pacienco kaj sinrezigno, observi silenton kaj deteni sin de senbezona parolado. Ĉar la lango estas brula fajro, kaj superflua parolo estas mortiga veneno. La materia fajro konsumas la korpon, dum la fajro de la lango detruas la koron kaj la animon. La forto de la unua daŭras nur dum kelka tempo, dum la efiko de la lasta postrestas dum jarcento.

La serĉanto devas ankaŭ konsideri klaĉadon kiel gravan pekon, kaj teni sin for de ĝia kampo, ĉar klaĉado estingas la vivon de la animo. Li devas kontentiĝadi per malmulto kaj esti libera de ĉiu supermezura deziro. Li devas alte taksi la rilatojn kun tiuj, kiuj rezignis la mondon, kaj rigardi evitadon de fanfaronemaj kaj mondamaj personoj kiel ŝatindan bonon. Je ĉiu tagiĝo li devas preĝoturnadi sin al Dio kaj per la tuta animo persisti en la serĉado de la Amato. Li devas konsumigi ĉiun spiteman penson per la flamo de la rememoro pri Li kaj kun la rapideco de fulmo pasi preter ĉio ekster Li. Li devas helpadi senhavulojn kaj neniam rifuzi sian bonvolon al malriĉuloj. Li devas elmontradi afablecon al bestoj, kiom pli al siaj proksimuloj, al tiuj kiuj estas dotitaj per la parolpovo. Li ne devas heziti oferi sian vivon por la Amato, nek lasi deturni sin de la Vero per homa kritikado. Li ne devas deziri por aliaj tion kion li ne deziras por si mem, nek promesi tion, kion li ne plenumos. Per sia tuta koro la serĉanto devas eviti rilatojn kun malbonfarantoj, kaj preĝi indulgon por iliaj pekoj. Li devas

pardonu pekulon kaj neniam malestimi lian malaltan staton, ĉar neniu scias, kia estos lia propra fino. Kiel ofte okazis, ke pekulo en sia mortohoro estis favorita per la esenco de kredo kaj, trinkinte la vinon de senmorteco, direktis sian flugon al la ĉiela Anaro. Kaj kiel ofte okazis, ke pia kredanto tiel ŝanĝiĝis en la horo de sia animliberiĝo, ke li falis en la plejfundan fajron. Eldirante tiujn ĉi konvinkajn kaj signifajn vortojn Ni celas memori al la serĉanto, ke li devas rigardi ĉion krom Dio kiel paseman kaj konsideri ĉion ekster Li, la Objekto de ĉia adorado, kiel neniaĵon.

Tiuj ĉi kvalitoj apartenas al la ecaro de altanimuloj kaj prezentas la karakterizaĵojn de spirituloj. Ili estis jam menciitaj ĉe la kondiĉoj de la migrantoj, kiuj iras la Vojon de la Pozitiva Sciado. Kiam korpura migranto kaj sincera serĉanto estas plenuminta tiujn ĉi esencajn kondiĉojn, tiam, kaj nur tiam, li povas esti nomata vera serĉanto. Kiam li estas plenuminta la kondiĉojn, kiuj prezentas la sencon de la verso *"Kiu serĉas Min animstreĉe"* **, li ĝuos la benon, entenatan en la vortoj: *"Tiu Ni certe gvidos sur Nian vojon."* **

Nur kiam la lampo de serĉado, de fervora penado, de sopirplena deziro, de pasia sindono, de arda amo, de ravo, de ekstazo estas ekbruligita en la koro de la serĉanto, kaj la ventoj de Lia amfavoro estas blovitaj sur lian animon, nur tiam dispelita estos la mallumo de eraro, disigitaj estos la nebuloj de dubo kaj senfido, kaj la lumoj de sciado kaj certeco ĉirkaŭvolvos lian animon.

En tiu horo la mistika Heroldo, portanta la ĝojan novaĵon de la spirito, elbrilon el la Urbo de Dio, lumradie kiel tagiĝo, kaj per la trumpetvoko de la sciado vekos la koron, la animon kaj la spiriton el la dormo de malzorgemo. Tiam la multriĉaj malavaraĵoj kaj verŝopluvanta favoro de la sankta kaj eterna Spirito donos tian novan vivon al la serĉanto, ke li trovos sin dotita per nova okulo, nova orelo, nova koro kaj nova menso. Tiam li meditados pri la diversaj signoj de la universo kaj penetros la kaŝitajn misterojn de la animo. Rigardante per la okulo de Dio, li ekvidos en ĉiu atomo pardonon, kiu kondukos lin al la stato de absoluta certeco. Li malkovrados en ĉio la misterojn de dia Sinelmonstro kaj la pruvojn de eterna Revelacio.

Ni ĵuras je Dio! Se tiu, kiu paŝas la vojon de gvidado kaj deziras supreniri la altaĵojn de justeco atingos tiun ĉi gloran kaj superegan staton, li flarsentos trans la distanco de mil mejloj la aromojn de Dio kaj vidos la brilegan matenlumon de la dia gvidado, leviĝantan super la tagiĝlokon de ĉiuj aĵoj. Ĉiu aĵo, kiel ajn malgranda, estos por li revelacio, kondukanta lin al lia Amato, la Celo de lia serĉado. (...)

Bahá'ulláh

* Korano 16,43. [16,44 en la klasika esperanta traduko farita de Prof. Italo Chiussi, *"La Nobla Korano"*, (Kopenhago, 1970, p.257, surao *"An-Nahl"*) : *"Ni sendis nur virojn, al kiuj Ni donis la revelacion - demandu do tiujn, kiuj posedas la admonon, se vi mem ne scias".*]

** Korano 29,69. [29,70 en la esperanta traduko : *"Tiujn, kiuj strebas por Nia afero, Ni gvidos sur Niajn vojojn. Vere Allah estas kun tiuj, kiuj bonfaras."* (p.401, surao *"Al-Ankabût"*).]

Islam-Kristanaj paroj

La Grupo de Islam-Kristanaj Familioj (konsistigita de paroj kies unu duonparulo estas kristana kaj la alia islama) ĉiujare kunvenas ekde 1976*.

La ĉi-jara renkontiĝo okazis dum la pentekosta semajnfino en Versajlo. Unuafoje ĉeestis du paroj venintaj de Italio, kaj aŭstria teologiestudento kiel observanto.

Fine de la renkontiĝo kvar ĉefpunktoj estis difinitaj :

1/ Islamo ne estas la bildo kiu estas donita per iuj eventoj aŭ iuj landoj. Oni devas doni favoran bildon de ĝi.

2/ La volo kontroli migradajn fluojn, ĉe la eŭropaj politikaj sferoj, **ne povas pravigi** : — malebligi ke tiuj kiuj amas unu la alian kaj volas kune vivi povos tion fari ;

— malebligi normalajn rilatojn kun la familio ;

— **rifuzi akcepti kiuj estas minacataj.**

3/ La islamanoj kiuj vivas en Francio [kaj en Eŭropo] devas havi la samajn eblecojn vivi, studi kaj transdoni sian Fidon, kiel la kristanoj. 4/ Niaj diferencoj ne estas problemo, sed male riĉeco, suplemento da valoroj.

Kontaktadreso (ankaŭ en esperanto) : Ghislaine kaj Hosejn Bayod, 15 rue de l'Espérance, 59132 Trelon, Francio (tel 27 59 71 10).

* Pri ĝia renkontiĝo en junio 1992, vidu Asistilon n-ro 13, p.14 .

La danĝera lingvo

..... (Alĝerio), 27-4-1994

Kara Karlo,

Delonge mi ricevis vian leteron datitan je 24-6-93 sed, bedaŭrinde, ĝi alvenis en malbonaj cirkonstancoj ĉar mi travivas malfacilaĵojn pro esperanto ; ĉiu ŝatanto de iu ajn eŭropa kulturo estas minacata de la integristoj. (...) Ne imagu ke mi senkiale silentis, ĉar la situacio estas ege grava, mi eĉ povus esti iam ajn mortigata.

Pro tio mi provis foriri de Alĝerio al iu ajn eŭropa lando sed, ve, ĉe neniu el miaj amikoj mi trovis helpon.

Mi tre bone ja komprenas, sed mia situacio estas timiga, mi jam estis eksigata de mia laboro post mia partopreno en la Universala Kongreso (...) ĉar oni difamigas ke la inventinto de "Esperanto" estis judo.

Pro tio oni akuzas min ĉar mi lernis esperanton ; mi eĉ instruis ĝin al kelkaj el miaj samlandanoj.

Amike, (subskribo)

P.S. Vi eble havos novaĵojn de mi se mi plu vivas.

...la danĝera revuo !

Strasburgo, la 1-5-1994

Mi havas novaĵojn pri X... . Li ricevis mortminacojn de la integristoj, ĉar li havas tro bonan konon de la franca lingvo kaj eŭropa kulturo, kaj ĉefe, ĉar li rilatas kun eksterlandanoj per iu lingvo inventita de judo. Ŝajnas, ke antisemitismo estas nepra elemento de islama integrismo, kaj ke tio aplikiĝas al esperanto. Tial li dum longa tempo rezignis pri esperanto. Tamen finfine li decidis reveni al esperanto, tial li skribis al mi. Do mi demandis lin, ĉu mi renovigu lian abonon al "Asistilo", aŭ ĉu interreligia revuo estas tro danĝera por li en la alĝeria kunteksto. Li respondis, ke efektive ricevi Asistilon estus tro danĝere, do ke mi ne renovigu lian abonon.

Do mi pagos abonon al alia nepagipovanto (...)

Jacqueline Lépeix (F)

Dialogoj

Rilate mian promesitan artikolon pri "La plureco de la religioj kie Dio samtempe estas Unika kaj Ĉio...", jen jam kiel prologo la dialogo kiu okazis inter medicinstudento kaj mi.

Ni parolis pri la malbono kaj la sufero kiuj, laŭ mi, ne estas multe agadefiko de Dio sed ja tiu de la homoj. Dio estas nur Amo : Amo tiom totala ke ĉio estas kaj estos pardonita ; kompleta pardono, ĉefe por la nekredantoj ĉar nur la kredantoj povas peki*. Do kiel Li povus fari malbonon al ni, suferigi nin ? (Alia temo...)

Filo de amikino, tiu studento, arabo kaj islamano, diris frazon similan al cito de Andre Verheyen**, jenan : "La citologio***, studita kaj malkovrita en la laboratorio per teknikaj mikroskopoj tre detaligaj, ĉio ĉi gvidita de eminentaj sciencaj profesoroj (...) La vera origino, same kiel la komplekseco, de ĉiuj ĉeloj el la senlime malgranda, restas granda mistero. Ĉiuj raciaj esploradoj restas sen respondoj." Por li temas pri la malkovro de Dio, de ties grandeco, de ties Ĉeesto sentata en la plejprofundo de ni, la tria "mio" de Freŭdo por iuj...

Anoj de tiel diferencaj religioj, ni tre bone komprenis unu la alian : ni parolis pri la sama Dio, ni sentis la saman varmon, kvankam reciproke respektante la praktikojn. La sama Lumo lumigis nin tra nia lingvaĵo el vortoj - vortoj tiel similaj ! Ni alvenis al komuneco de pensoj laŭ certa maniero : la kompreno de la Alia, nia proksimumo, ne diferenca sed tia kia ni estas.

Liliane Lambert (B)

* Mi referencas prelegon de P-o Weber ĉe monaĝejo *La Interligo*.

** "Kiu malkovris en sia mikroskopo la kompleksecon de la senlime malgranda kaj kiu observis en sia teleskopo la misterojn de la senlime granda, tiuj certe povos pensi pri Granda Arkitekto". Du rimarkoj pri tio ĉi : tiu frazo estis nur ero (pli malpli la antitezo) de tuta rezono, kiu celis ne al "Arkitekto, eĉ Granda", sed al "Senlima Fonto de Amo !".

*** Maltaŭga PIVa termino : ne scienco de la citoj ...sed de la ĉeloj !

Korespondi deziras

Kinshasa, la 23-03-1994

Karaj fratoj,

Mi salutas vin nome de Nia Sinjoro Jesuo-Kristo.

Mi volas lerni Esperanton, mi do bezonas kompletan materialon. Kaj mi ankaŭ deziras ricevi esperantlingvan biblian kurson.

Miaj karaj, mi ankaŭ bezonas kelkajn korespondantojn el ĉiu nacieco, sed kiuj parolas Esperanton kaj kiuj denove naskiĝis [en la Spirito], inter 25- kaj 45-jarajn. La graco de la Sinjoro Jesuo-Kristo, la amo de Dio kaj la komunikado de la Sankta Spirito estu kun vi ĉiuj !

Jonatha Kombe p/a Mboso Bosco
BP 9360 Kinshasa I, Zairio

Movado Jean

Mortis antaŭ kelkaj monatoj la svisa esperantisto **Marc Rohrbach**, amiko de la Kvakeroj, kiu fondis la Movadon Jean [Johano]. La movado daŭras. Esperanta traduko de tre grava libro de M. Rohrbach, *Paco en ŝtormo*, baldaŭ aperos.

Gaby Tréanton

Mariavitoj : II - Rilatoj kun esperanto *

Aperinta samlande kaj preskaŭ samtempe kiel esperanto mem, la mariavita movado frue vidis en tio signon ke ĝiaj anoj lernu kaj uzu la internacian lingvon kaj instruon ĝin en siaj lernejoj¹. Pro ordono ĉefe de M-ro Johano Mikaelo Kowalski, la kunfondinto de la pastra movado fariĝinta ĉefepiskopo, kaj gvidanto de la movado post la morto de Panjo Kozłowska en 1921, efektive ĉiuj episkopoj kaj pastroj antaŭ la dua mondmilito estis esperantistoj. Laŭ mandato de M-ro Kowalski tiun laboron gvidis P-ro Adam Furmanik, esperantisto jam ekde 1888 (kaj delegito de UEA dum multaj jaroj).

Interniario

En 1927 la tiutempe 25 polaj komunumoj aliĝis al la *Interniario* kiel *Mariavita Rondo Esperantista* kun propra rubriko en *Inter ni*.

Tiu *Interniario* estis fondita en 1926 de la brita kvakero Livingstone Jenkins (1881-1966), cetere kun jam eksplicita religikompara karaktero ĉar laŭ ĝi la interna ideo de esperanto, kiun ĝi celis aplikigi, estas: "*la rekono ke oni ne povas akiri la veron sen serĉado kaj komparo de la instruoj de la aliaj religioj kaj filozofioj; la serĉado por la vero sen ia ajn dogmo aŭ ia ajn antaŭjuĝo; unu komuna kaj egala frateco inter la anoj de ĉiu raso, nacio, klaso kaj religio...*"². Kaj *Inter ni*, ĝia organo kiu ekaperis ankaŭ en 1926, larĝe malfermis siajn paĝojn por plej diversaj fakaj rondoj: budhana, filozofia, islama, juda, junul-kristana, kontraŭ-vivisekcia, kristan-penada, kvakera, mariavita, rozkruca³, ktp.

P-ro A. Furmanik fariĝis funkciulo de la *Interniario*. Sed la morto en 1931 de la brita kvakerino Priscilla Hannah Peckover⁴ tute paralizis la aktivecon de Jenkins mem kaj de lia movado.

Mariavita Esperantista Ligo

En 1931 P-ro Furmanik starigis do mariavitan esperantistan ligon kun propaj organoj: *Renkonte al la suno* kies redaktoro li estis⁵, kaj *La juna mariavito*. Li verkis ankaŭ 4-paĝan prezenton, *Mariavitismo: Ĉefaj principoj de ĝia kredo kaj organizado*; kaj la mariavitoj eldonis plurajn libretojn en esperanto.

La agado ĉesis pro la dua mondmilito, sed tuj poste rekomenciĝis, laŭ malpli granda skalo. (Almenaŭ en la unua postmilita kongreso de Asocio de Pollandaj Esperantistoj en 1946 partoprenis P-ro Furmanik, jam 80-jara, kiu salutis ĝin nome de la mariavitoj). Dum la Varsovia Universala Kongreso en 1959 M-ro Jan Sitek, ĉefepiskopo de la mariavitoj, celebris ekumenan meson.

Inter pastroj precipe Fr. Rostoworowski⁶ stimulis la esperantajn rilatojn, i.a. kiel loka UEA-delegito. Li tradukis en 1963 la 263-paĝan libron de Arthur Rhode, *Ĉe la mariavitoj*⁷, kaj samjare prilaboris kaj tradukis 145-paĝan prezenton *Kio estas mariavitismo*. Li ankaŭ parolis pri sia eklezio per la esperanto-elsendoj de Pola Radio.

Kaj la unua romkatolika hierarkiulo kiu vizitis la mariavitan preĝejon en Plock, en 1986, estis esperantisto: M-ro Miziolek, de Varsovio, prezidanto de la pola episkopa komisiono pri ekumenismo.

William Penn : 350-a datreveno

En 1644 naskiĝis William Penn, filo de angla admiralulo. 23-jara, tiu nobelido fariĝis kvakero. En tiu tempo kvakeroj estis ofte persekutataj. En malliberejo, en 1669 Penn verkis "*No cross, no crown*" (Sen kruco neniu krono), unu el la plej fruaj verkoj pri kvakerismo.

En 1681, ĉar la reĝo ŝuldis monon al lia patro, li repagis donante al Penn teritorion en Ameriko. Koloniuloj el Germanio, Nederlando kaj Anglio fondis Pensilvanion. Penn verkis por tiu ŝtato konstitucion por "*lasi al si mem kaj al siaj posteuloj neniun povon malutili, tiel ke la volo de unu homo ne povu ĝeni la bonstaton de tuta lando*". Tamen ne ĉio estis ideala en Pensilvanio: parto de la pensilvaniaj kvakeroj posedis sklavojn. En 1688 germandevenaj kvakeroj metis demandon pri tio, sed nur post 1770 la pensilvaniaj kvakeroj liberigis siajn sklavojn. Ĉar Penn estis spertinta la malliberejojn en Anglio, li zorgis en Pensilvanio pri decaj vivkondiĉoj kaj laborebleco por la malliberuloj. La mortpuno ekzistis nur por du krimoj, perfido kaj murdo, kiuj dependis ne de la loka justico, sed de la angla reĝolando.

Penn konsideris ke la reĝo de Anglio donacis al li teritorion kiu ne apartenis al li. Tial li aĉetis ĝin de la indianoj. Estis interkonsentoj inter la pensilvanianoj kaj la indianoj: konflikto devis esti juĝata de 12 ĵurianoj, 6 kristanoj kaj 6 indianoj. Pri tiuj interkonsentoj Voltero* skribis, ke ili ne estis ĵuritaj (kvakeroj rifuzas ĵuri) kaj ne perfiditaj. Ĉar pensilvanianoj kaj indianoj pace kunvivis, Pensilvanio en tiu epoko ne havis armeon. Nur en la 18a jarcento, kiam la kvakeroj fariĝis minoritato, Pensilvanio antaŭvidis militbuĝeton por militi kune kun la aliaj anglaj kolonioj kontraŭ la indianoj kaj la francoj.

Penn pensis ankaŭ pri la monda paco. En 1693 li publikigis sian "*Projekton por igi la pacon en Eŭropo firma kaj daŭrema*". Ĝi estis antaŭbildo de la Societo de Nacioj, aŭ de la Unuiĝintaj Nacioj. William Penn mortis en 1718.

Kompilis **Jacqueline Lepeix**

Laŭ Edouard Dommen, "*Les quakers*", kiun ŝi esperantigis, kaj iam eldonos Kvakera Esperanto-Societo.

* De kies naskiĝdato ni provos iel celebri la 300-an datrevenon en venonta numero. (*Noto de la redaktoro.*)

(*Notoj de la artikolo "Mariavitoj"*)

* Ĉefe laŭ **Karl-Olof Sandgren**, "Religia literaturo en Esperanto", Boden: Nordenstorms förlag, 1994, p.89-90 kaj 45-47.

1/ Eĉ, kvankam kutime ŝiaj unuaj mistikaj travivaĵoj estas datitaj je la 2-8-1893, ŝajnas ke "laŭ la esperantistoj-mariavitoj, Panjo Kozłowska spertis sian unuan mistikan travivaĵon en 1887", kaj ke "tiun koincidon kun la naskiĝo de Esperanto ŝi [mem] konsideris signon de Dio, ke mariavitoj devas lerni kaj disvastigi Esperanton" (Zofia Banet-Fornalowa, "Eklezio mariavita centjara", en *Monato*, januaro 1994, p.29).

2/ Laŭ *Enciklopedio de Esperanto*, t.I, p.251a.

3/ La revuo "La rozumita kruco", monata organo de la "Ligo supernacia de la rozkrucaj", post verŝajne 4 n-roj redaktitaj de Th.W. Teich en 1928-29, daŭris iom da tempo kiel parto de "Inter ni" ek de 2/1929.

4/ Ŝi grandparte financis la movadon, kaj ankaŭ ebligis la eldonon de la *Biblio* en esperanto en 1926.

5/ Sed eble aperis nur du numeroj, 16- kaj 32-paĝa, en 1931 kaj 1932?

6/ Aŭ Rostoworkowski? 7/ Ambaŭ neeldonitaj binditaj manuskriptoj.

Granda Unueca Kredo

Feng Run, 94-02-24

El iu amiko mi ricevis vian adreson kune kun via celo. Verdire, mi eksentas, ke ni havas vastan kampon por kunlaboro.

Ĝuste pro religia interkompreniĝo, mi ĵetas min en kreado de Granda Unueca Kredo. La fakto estas okulfrapa : homaro, kiu vivas komune, bezonas Unuecan Kredon.

Kio estas nia ilaro por atingi la celon ? Moderna natura scienco. Pri la detalo ĉi tie mi ne volas multe diri.

En esperanto mi bezonas tekstojn de diversaj religioj, precipe de Budhismo kaj Islamismo. Mi deziras kunlabori kun vi. Sen pacienco mi atendas vian rapidan respondon.

Via , *Jebumo*

Granda Unueca Kredo

(mallongigo : Guk-o)

Inter kulturo-randoj diversaj konfliktoj okazas en nuna mondo, eks-Jugoslavio, Hindia Kaŝmiro k.s.

Pli multe da aferoj troviĝas en historio, la batalo inter Kruco kaj Lunarko, apartiĝo de Germanio...

Fakto ke Komuna Eŭropo sur la Kruco elfondiĝis, refoje inspiras nian ideon fondi Grandan Unuecan Kredon.

Ofte troviĝas miskompreno pri Guk-o, jene :

1/ Gukisto celas pereigi diversajn religiojn.

2/ Guko estas salato de religio kaj ateismo.

Guko renkontiĝas kun religio kaj ateismo ĉe klarigo de amo kaj sorto : viva proceso. Pere de teorio de scienco, precipe Teorio de sistemeco kaj de komplementeco en atomismo, dank'al E. Laszlo kaj N. Bohr. Tial Guko havas sian teorion fundamenton kaj subtenas diversajn civilizajn religiojn.

Komentario pri Guko ĉefe en du :

1/ Guko konscie influas politikon.

2/ Petu esperantistojn traduki Gukon en sian naci-lingvon el esperanto.

Pri 1/. Pere de Guk-a fundamento vi povos scii ke nuna mondo bezonas novan politikan strukturon kaj ni influos ĝin laŭ demokratio.

Pri 2/. Ĉi tiu estas praktikisma ideo. La mondo bezonas Gukon kiel eble plej rapide. Tiel nia perdo malpli-ĝos. Aliflanke en Guko la aŭtoro klare esprimas subtenon al esperanto en sia teksto.

Aliaj menciindaĵoj estas proceso de fondo de Guko. La celo estas elfondi la plej grandan universalan moralan studan centron. Proceso : 1/ Verkado de Guko.

2/ Estigado de Gukista organizo.

La laboro estas malfacila. Ĉu vi interesiĝas kaj kura-ĝas kunlabori kun ni ? Bonvolu skribi al :

Zhai Yuzhong
Xi Yang jia Ying
Feng Run He Bei
064009 Ĉinio

Cent demandoj pri Guk-o

Jen estas kuko de vivo.

Vi devas legi.

I – Pri Guk-o

1. Kio estas Guko ? – *Mallongigo de Granda Unueca Kredo.*

2. Kio estas Granda Unueca Kredo ? – *Kredi unuecan, nuran, plej altan dion en tuta kosmo : Gukon.*

3. Kie situas Guko ? – *En la kosmo ; en via koro.*

4. Ĉu Dio estas Guko ? – *Jes.*

5. Kial ? – *Ambaŭ estas al vero.*

6. Ĉu Alaho estas Guko ? – *Jes.*

7. Kial ? – *Ambaŭ estas al vero.*

8. Ĉu Budao [=Budho] estas Guko ? – *Jes.*

9. Kial ? – *Ambaŭ estas al vero.*

10. Kiel rilatas inter diversaj dioj kaj Guko ? – *Ilia natureco estas unueca sed korpo ne estas unueca.*

11. Kial la natureco estas unueca ? – *Rigardu ĉirkaŭen, la aperaĵo estas unueca.*

12. Kial la korpo ne estas unueca ? – *Legu la sanktajn skribojn : la litero, la vorto, la frazo.*

13. Kiel naskiĝis la kosmo ? – *Iam, Guko elfaris la kosmon.*

14. Kio estas la materialo ? – *Etero.*

15. Kio estas la ilo ? – *Ordo.*

16. Per kio la kosmo kreskas ? – *Per movo.*

17. Kia regulo troviĝas en ĝi ? – *Akcidenteco post neceseco. Neceseco post akcidenteco.*

18. Kio la reguloj estas ? – *Konstanta ideo de Guko.*

19. Ĉu Guko ankaŭ elfaris homon ? – *Jes, en torento de tempo, Guko elfaris homaron.*

20. Kie estas paradizo ? – *En brakoj de Guko.*

21. Kia estas paradizo ? – *Feliĉa kaj paca.*

22. Kie estas infero ? – *En brakoj de Guko.*

23. Kia estas infero ? – *Mizera.*

24. Ĉu demonoj estas malamiko de Guko ? – *Tute ne, ankaŭ ili estas faritaĵo de Guko.*

25. Kial Guko faris demonon ? – *Laŭ la volo, por harmonio.*

26. Ĉu Guko figuras kiel homo ? – *Ĝi estas senlima.*

27. Ĉu Guko estas ĉiamviva ? – *Jes.*

28. Ĉu Guko estas ĉioscia ? – *Jes.*

29. Ĉu Guko estas ĉiopova ? – *Jes.*

30. La plej granda ?

Ĝi estas tuta kosmo de apero.

Ĝi estas vojo de homaro.

Ĝi estas vero de esploristo.

Ĝi estas feliĉo-fonto de adepto.

(Sekvota)

Leteroj de legantoj

De Kriŝnano

Semaphore Park (Aŭstralio), 13-4-1993

Ĉiun gloron al ŝri ŝri guruo kaj gaŭrango !

(...) Mi tre neregule korespondas kun hare-kriŝnanaj esperantistoj en Hungario, Rusio kaj Kosta-Riko, sed ni neniel estas organizitaj kaj ĝis nun havas eĉ ne novaĵleteron. (...) Kvankam mi tion tre deziras, mi ne havas sufiĉe da mono por akcepti vian proponon ke mi respondecu pri paĝo en Asistilo (...) Permesu al mi esprimi miajn bondezirojn al vi pro la laboro kiun vi faras por la homaro (...)

Riŝio Kumaro-daso (**Bob Felby**)

Respondeto. Unuiĝo faras forton : ĝuste ĉar vi ne havas propran novaĵleteron, se vi Kriŝnanoj ĉiuj iomete kontribuas (aŭ almenaŭ abonus !), vi povus havi regulan ligileton pere de Asistilo...

Pri senpagaj libroj

Ingham (Aŭstralio), 26-7-1993

(...) Nun mi komencis fotokopie fari novan eldonon de la libro Profetino Helena Konttinen. Mi havas unu peton al vi : bonvolu meti donace en vian revuon ĉi-sekvan anoncon :

Mi donace sendos al vi du librojn : "*Profetino Helena Konttinen*", 232-paĝa, kaj "*Lingvologia Revuo*", 70-paĝa. Nur petu senpage ! S-ro **Emil Hanhiniemi**, P.O. Box 764, Ingham, Queensland 4850, Aŭstralio.

Demando pri Mariaj aperoj

Zeltweg, 11-8-1993

Via Asistilo estas tre valora ilo je la signo de interfrata paco kaj amo. Ĉu ekzistas la mesaĝoj diaj faritaj en Medjugorze esperante ? Ĉu estas eble ricevi kontakt-adreson de M-ro Zanik (YU) ? (...) Nin ĉiujn interligas frate la Lumo kaj Amo de Dio. (...)

Anton Schaffer (Aŭstrio)

Malfruega (!) respondeto : Ekzistas libro de Vinko Oŝlak : "*La Dia Patrino parolas en Medjugorje*", Klagenfurt/Celovec : Eldonejo de s. Hermagoro, 1986, 98p. Ilus. Mapo. ISBN 385013 C568. UEA-prezo (en 1989) 17,40 gld. Pri adreso de M-ro Zanik mi mem ne scias ĉar li loĝis en Bosnio-Hercegovino (Mostar).

Helpopeto pri hindaj viktimoj

Bangaloro, 12-10-1993

Temo : helpo al la tertremaj viktimoj en Bharato. Kiel vi jam delonge scias, dum la lasta semajno de septembro 1993 tertremo de granda intenseco lasis pli ol 30.000 mortintajn homojn kaj igis milojn da homoj sen-domaj (...)

Kompreneble, ni konstatas ke la tuta restariga programo en tiuj ĉi vilaĝoj bezonas longan tempon kaj multe da mono kaj helpo. Rilate al la longtempa restariga programo al la vilaĝanoj, la neregistaraj organizoj (NROj) kiel bone konataj "*Oxfam*", "*Action Aid*" (Helpago), "*Community Help Centre*" (Komunuma Sana Centro), kaj similaj, jam kuniĝis kaj aranĝis helpan komitaton en Bangaloro.

Bangaloro Esperanto-Centro decidis partopreni kaj subteni tiun ĉi noblan penon de la NROj kaj lanĉis programon helpi. Ni petas al vi ke vi aranĝu kolektadon de ebla kontribuaĵo, kiom vi povas, de esperantistoj [aŭ ne] el via lando, kaj ke vi sendu la monon al ni por helpi en la restariga programo.

Bonvolu ĝiri la ĉekojn / poŝtmandatojn en la nomo de "*Oxfam, India Trust*", kaj sendi al *Bangalora Esperanto-Centro, 97, 24th Cross, 3rd Block East, Jayanagar, Bangalore 560011, India*.

Kun granda espero ke geesperantistoj partoprenos en la nobla tasko, nome, helpi la suferintajn viktimojn de katastrofo. Multan antaŭdankon.

M.C. Suresh (Bharato)

Korespondi deziras

Colombo, 15-12-1993

(...) Mi estas interesita pri biblia, teologia kaj filozofia aferoj, kaj volonte mi interŝanĝus ideojn kun aliaj.

Mi estas kristano, sed kiel vi jam scias, la plej parto de la popolo en Ŝrilankao* estas budhana. Tamen mi studas ĉiujn religiojn. Pri orientalismo, antaŭ pluraj jaroj Patro Angelo Duranti de Italio skribis al mi ke li volus (...) diskuti kelkajn temojn kun budhanoj kaj hinduoj (...)

En Ŝrilankao ni eldonas anglalingvan revuon nomitan "*Dialogo*" kaj de tempo al tempo mi verkis artikolojn por ĉi-tiu revuo. (...)

Ronald C. Peries (Sri Lanko)

De Kvakero

Oslo, 26-12-1993

(...) Asistilo estas impone altkvalita produkto, kiun mi legadas kun granda intereso, kaj precipe pro unu artikol(ar)o mi volas danki. Temas pri "*La dialogo inter religioj*" de André Gounelle. Precipe lia tria tezo, pri la rilato inter religia strukturo kaj la revelacio sur kiu ĝi estas fondita, kiu enhavas novajn vidpunktojn por mi. La artikolaro donis al mi tute novan komprenon pri la senco de la religioj, kaj ankaŭ iom heligas al mi la problemojn kiujn ni foje sentas en la kvakera societo pri ties identeco. Ŝajnas al mi ke la moderna kvakereco, en kiu troviĝas nur apenaŭ restaĵoj de mitoj, ritoj kaj dogmoj, preskaŭ ne plu estas religio en la aktuala senco.

Douglas Draper (Norvegio)

* Sri Lanko laŭ PIV.

Pri bharata esperantista vivo

Bangaloro, 4-1-1994

(...) Dankon pro via letero kaj la helpo al la tremaj viktimoj (...) La feliĉa novaĵo estas ke inan beb-on naskis mia edzino. Ni nomis la beb-on Samanvitha. Mi sendas fotojn de la bebo.

Lastan semajnon gesinjoroj Probal Daŝgupto kaj ilia filo venis al Bangaloro (...) Dum lia vizito, en la ĉesto de Prof. L.S. Seŝagiri, ni lanĉis priesperantan libron, "Let us learn Esperanto", verkita de d-ro Ranganayakulu (...)

Ni relanĉis la nacian novaĵleteron "Fenestro". D-ro Ranganajakulu redaktas la revuon (...)

S.S. Pradhan (Dir. de Bangalora Esperanto-Centro)



La ceremonio de la donado de la nomo al la novnaskito: longan kaj feliĉan vivon al la bebino kaj ties gepatroj !

Pri morala interkonsento de la religioj

Lille, 17-1-94

La respondeculoj petas de mi prepari la temon de la venonta katolika franca kongreso. Mi elektis : "La internacia Paco per la internacia morala konsento de la grandaj religioj". Pri tiu temo oni povas trovi, laŭ mi, valorajn disvolviĝojn en la libro de Hans Küng, "Projet d'éthique planétaire" [Projekto de monda etiko]. (...)

P.S. Nura sugesto : ŝajnas al mi ke estus aparte utila kaj interesa traduko en Esperanto, de kelkaj libroj de Hans Küng, ekzemple "Theologie im Aufbruch – Eine ökumenische Grundlegung" kaj "Projekt Weltethos". Se iu germana Samideano trovas temon tion fari ! ...

Patro Louis Bourdon, o.p. (Francio)

Pri kunvenoj de meditado

Lascuarre (Huesca), 28-9-93

(...) Vi konis min dum la Valencia Kongreso, ĉu vi memoras ? Mi parolis al vi pri silenta meditado, post la duonhora silentado (...) Mi sendas al vi ankaŭ la informon, kiun ni sendas al tiuj, kiuj petas informon pri meditado [vidu sur sekva paĝo]. Sed mi volus diri pli al vi.

Unue, neniu gajnas monon per ĉi tia meditado. Kompreneble, estas necesa kelke da mono por aĉeti manĝaĵon, ktp... , sed vi povas doni monon nur unu monaton post la kunsido, por eviti ke iu donu monon pro ia influo. Vi povas supozi, ke neniam estas troa mono ! Eĉ kelkfoje estas necese, ke la akompanantoj kaj la helpantoj donu monon.

Ankaŭ estas tre strange, ke ne estas doktrinoj, majstroj aŭ estroj. Nur estas "akompanantoj": homoj kiuj akompanas vin sur via vojo, sed nek influas, nek instruas. Ni opinias, ke ne estas necese paroli pri la interna vero, nur estas necese esti en silentado kaj rigardi en si.

Kiel oni estas akompananto ? Simple kiam oni profunde sentas, ke oni povas kaj volas esti akompananto, kaj ankaŭ la aliaj akompanantoj sentas ke oni povas akompani. Kiam okazas ĉi tio ? Oni ne scias : eble post unu kunsidado, eble post dek kunsidadoj, eble post cent kunsidadoj, eble neniam.

Mi komprenas, ke ankaŭ ŝajnas stranga meditado "sennoma". Sennomaj la akompanantoj, la helpantoj, kiuj donas la monon kaj eĉ la propra meditado. Nek nomo, nek historio. Nur silento, vera silento. Dum silento, nomoj ne estas necesaj. Kial oni bezonas nomojn ? Ĉar per nomoj oni povas pensi, klasifiki, juĝi, kredi, reĵeti, inklinegi, fieriĝi, scii, diskuti, senti certecon... sed sen nomoj tio estas tre malfacila. Estas same kiel "Zen", sed tre radikala.

Kutime, ni praktikas ĉi tiun meditadon dufoje jare en kristana monaĥejo, en (hispanaj) Pireneoj ; sed ne estas kristana meditado : la monaĥoj nur luigas sian monaĥejon por la meditado. Sed *se en alia lando estas dek personoj kiu volas praktiki ĝin, ni povus praktiki kun ili kaj akompani ilin se estas taŝga loko.*

La adreso al kiu oni povas skribi por peti la "informon pri meditado" aŭ veni al la meditado, estas : *Rafael Sanchez, Apdo 39, E-22430 Graus (Huesca) Hispanio.*

Li estas tiu kiu, dum ĉi tiu jaro, organizas la kunsidadojn. Li estas mia najbaro, kaj mi povos traduki la leterojn por li. Mi pensas, ke ankaŭ estas informoj pri meditado en franca lingvo [plie de la hispana].

Mi pensas, ke vi jam scias sufiĉe (...) pri ĉi tiu meditado. Kompreneble, se vi volas vere scii pri ĝi, vi povos partopreni en venonta kunsidado.

Lorenzo Mediano (Hispanio)

Kunspertu 10-tagan

LA ESENCO

Eltrovi sin tia kia oni estas, dum dek tagoj da silento, kaj dek unu horoj da ĉiutaga meditado. Sen doktrinoj, sen instruantoj. Atingebla por ĉiu, eĉ se oni ne scias mediti, kaj tute senpaga.

LA MANIERO MEDITADI

Ĉu estas necese meditati per ia speciala maniero por eltrovi sin? Ni proponas simplan sperton al vi: sidiĝu dum unu horo kaj provu observi vin tia kia vi estas. Vi eltrovos, ke tio estas tre malfacila sen speciala maniero meditati; kaj krom distroj, observi sin estas tre necerte kiam oni provas ĝin.

Ĉi tiu estas la motivo pro kiu oni uzas specialan manieron meditati, kiu estas tre natura kaj simpla, por lerni observi sin. Post tiu lernado, oni povas fari ĝin sen ia maniero, sed ĝi estas tre utila por komenci.

La maniero kiu oni uzas por meditati estas tre simpla kaj facila: unue, oni observas la sensacon de la aero pasanta tra la nazo kiam oni spiras nature, kaj poste oni lernas observi la sensacojn de sia korpo. Observi ion malplaĉan kaj ne repuŝi ĝin, aŭ observi ion plaĉan kaj ne halti tie, estas tre malfacile; tamen kiam oni koncentriĝas sur sia spiro kaj sur la korpaj sensacoj kiujn kaŭzas al ni la plaĉa aŭ la malplaĉa, oni povas fariĝi objektiva observanto.

Ĉi tiel, paŝo post paŝo, sen ia perforto, oni povas profundiĝi en sin, kaj tiel oni kontemplas siajn pensojn, siajn timojn, siajn sentojn, sian doloron... malfermiĝante al sia korpa realeco sen ion imagi.

Oni ne povas kompreni kia estas ĉi tiu maniero meditati kiu ŝajnas tiel simpla, nek kiujn rezultojn ĝi kaŭzas, sen sperti ĝin. Tamen, estas grave scii kio ĝi ne estas: ĝi ne estas maniero por atingi mensan pacon, nek por akiri korpan konscion, nek por lerni rezisti doloron, nek por superi subkonsciajn konfliktojn, nek por perfektigi sin, nek por havi ian povon. Tiaj aferoj (kaj pliaj kiujn vi povas kredi atingi) ne estas gravaj; sed ili estas logaj malhelpoj kiuj povas forigi de la celo: la nura celo de la meditado estas doni al si ilon per eltrovi sin.

LA ORGANIZO

Se vi venas meditati vi renkontos kelkajn personojn:

- Meditantoj kiel vi, kiuj nur devas meditati kaj ne zorgi pri aliaj aferoj.
- Helpantoj, antaŭaj meditatoj kiuj, senpage, laboras por nutri kaj servi meditatojn, por ke meditatoj povu mediti sen bezoni ion fari.
- Akompanantoj, antaŭaj meditatoj kiuj, senpage, akompanas en la meditado la novajn meditatojn. Plie, ili parolas kun meditatoj dum dek minutoj ĉiutage, por instrui ilin pri la maniero meditati.

En la organizo estas iaj specialaĵoj kiujn vi devas koni:

* Ne estas majstroj nek doktrinoj: Ĉiuj volas lerni kion oni devas eltrovi en si; tamen ni opinias ke tio ne estas helpo, sed malhelpo. Ni preferas la silenton, por ebligi ke ĉiu spertu en libereco. Krome, ni kredas, ke nur utilas kion oni eltrovas per si mem.

* Ne estas estroj aŭ hierarkioj. Ni nur estas grupo de geamikoj kunigitaj per komuna sperto kaj la deziro transdoni ĝin.

* Tute senpage: Por iuj kiuj meditis, ĉi tio estis sperto ne taksebla, kaj tial neniu devas pagi. Pro tio, la helpantoj kaj la akompanantoj laboras senpage, tiel aliaj faris same por ili.

La mono necesa por aĉeti manĝaĵon aŭ por lupagi la ejon, ankaŭ estas donaco de antaŭaj meditatoj. Se, post kunsido, iu sentas, ke tio estis bona por li, kaj li volas diskonigi ĝin, li povas doni iom da mono por fari aliajn kunsidadojn. Tamen, oni devas atendi unu monaton antaŭ ol doni monon, por pruvi, ke la pliboniĝo estas reala. Se oni ne sentas, ke tio estis bona por si, oni ne devas doni monon. Se oni volas pagi, ni preferas, ke oni donu monon kaj laboron al aliaj bonfaraj organizoj.

ALIAJ GRAVAJ PUNKTOJ

* Ne estas promesoj: Ni nenion promesas al vi, krom konvenaj kondiĉoj por meditati, akompanantaro kiu apogos vin kaj helpos vian memdisciplinon, kaj maniero meditati tre simpla, kiu helpis nin, kvankam eble ĝi ne helpos vin. Ni nenion ofertas al vi, krom risko: ekvidi sin mem sen scii kion oni trovos.

* Ne necesas kredi je io, eĉ ne je la efikeco de la meditado. Se oni ne provas meditadojn, oni ne povas (kaj ne devas) kredi je ĝi.

* Ĝi estas dolorada: Dek unu horoj da ĉiutaga meditado, kun ripozoj ĉiuhore, sidante sur kusenoj sur planko, povas kaŭzi korpajn dolorojn. Ankaŭ oni povas havi psikologiajn dolorojn. Ni ne povas eviti tion, ni nur povas akompani vin kaj same travivi ilin kun vi.

LA NORMOJ

Dum dek tagoj da kunsidado, la normoj de konduto estas tre severaj, por ebligi profundan internecon, kaj por helpi toleri la doloron. La normoj estas grava helpo por meditatoj. Neniu normo estas arbitra, ili subtenas la internecon dum ripozoj kaj manĝoj, kaj ili helpas la meditatojn dum krizoj. Se iu malobservas normon, li estos invitata foriri, por sia bono kaj la bono de la aliaj meditatoj. La plej gravaj normoj estas:

- Meditati dum dek unu horoj ĉiutage, dum la dek tagoj de la kunsido. Estas ripozoj ĉiuhore.
- Vekiĝi je la kvara matene.
- Ne paroli nek ion komuniki kun iu, inkluzive rigardojn. Oni povas paroli nur kun sia akompananto dum dek minutoj ĉiutage.
- Ne legi, skribi, nek aŭskulti muzikon.
- Ne fumi, nek trinki alkoholaĵon, nek uzi drogon kiu modifas la menson.

intensan meditadon

- Ne seksumi, nek havi korpajn kontaktojn.
- Ne eliri ekstere de la spaco permesata.
- Ne uzi dum la kunsidado alian teknikon mensan, filozofian, energian, korpan, psikologian, religian aŭ spiritalan. Ne porti amuletojn nek religiajn bildojn.
- Ne fari agojn, gestojn nek bruojn, kiuj povas ĝeni aliajn meditantojn.
- Oni devas devigonti sin daŭrigi ĝis la fino, eĉ se oni kredas, ke oni ne atingas ian rezultaton.

Eĉ se oni pensas, ke iuj normoj ne estas utilaj, oni devas promesi plenumi ankaŭ ilin. Se post la fino de la kunsidado oni ankoraŭ opinias, ke ili ne estas utilaj, oni povos diri tion, kaj sugestoj kiel modifi ilin aŭ ilin forigi.

PRI LA MANĜAĴOJ KAJ LA KOMFORTAĴOJ

Iuj personoj pensas, ke la manĝaĵo estas tre grava. Por ĉi tiu maniero meditadi, manĝaĵo ne estas grava ; tamen, oni devos manĝi sen elekti (oni povas ne plu manĝi kiam oni ne plu havas apetiton). Nur se oni estas malsana, oni povas paroli pri tio kun sia akompananto. Dum la kunsidado, ne estas permesataj dietaj preferaĵoj: vegetarismo, krudismo, makrobiotismo, fasto, ktp. Manĝi aŭ ne manĝi, senti saton aŭ malsaton, manĝi purajn aŭ malpurajn nutraĵojn, nur komunikas al ni sensacojn por helpi koni nin mem.

Ankaŭ estas necese veni preta akcepti ĉiujn malkomfortaĵojn. Ni dezirus, ke la meditantoj sentu sin tre komforte, sed iam tio ne estas ebla.

PRI LA AMO

Ni ne ŝatas paroli pri amo : ni preferas manifesti ĝin per faroj. Se vi venos partopreni, vi manĝos kaj gastos ĉar nekonataj personoj donis monon, aliaj personoj servos vin, kaj ĉiam vi havos proksime akompananton, kiu suferos tiel kiel vi, nur por ke vi estu akompanata kaj por ke vi sentu vin sekure. Vi estos subtenata per amo, tamen ĝi estos silenta amo.

KIU POVAS PARTOPRENI ?

Povas partopreni en kunsidado ĉiuj personoj, kiuj sincere volas serĉi sin mem, per maniero reala kaj intensa. Ne estas gravaj la inteligenteco, la sperto pri aliaj manieroj mediti, la volo, la personaj problemoj nek la (mal)kapablo koncentriĝi. Ĉiuj povas fari ĝin.

Tamen, ĉi tiu meditado postulas havi la humilecon por rigardi sin mem, forgesante ĉion, kion oni kredas koni. Ĝi ankaŭ postulas havi la kuraĝon preni sian propran respondecon, ĉar neniu intervenos en la evoluo kaj oni ne povos apogi sin sur ia doktrino aŭ majstro.

Je ĉi tia maniero meditadi, oni devas komenci sen ion koni, kvazaŭ ĵusnaskiĝinto. Dum dek tagoj (nur dek tagoj), oni devas forgesi ĉiujn ideojn, esperojn, kredojn, antaŭajn spertojn kaj inkluzive tion, kion oni kredis koni de antaŭaj kunsidadoj.

Estas normale havi timon, kaj pensi, ke oni ne povos elteni normojn tiel severajn, precipe la dek unu horojn da meditado. Neniu povas havi certecon elteni la kunsidado, eĉ kiuj havas multajn spertojn, aŭ akompanantojn. Kun ĉi tia dubo, oni devas veni preta por intense meditati kaj plenumi la normojn per ĉiaj siaj fortoj.

Alia risko, kiun vi devas konsideri, estas, ke ni nenion promesas al vi. Estas eble, ke post la fino de la kunsidado, vi ne sentos, ke ĉi tiu estas bona por vi ; aŭ eĉ vi sentos, ke ĉi tiu estas malbona por vi.

GARANTIOJ POR LA MEDITANTOJ

Ni ofertas al la meditantoj garantiojn pri la respekto de ĉi tiu maniero meditadi rilate al ilia individueco :

- Malpermeso paroli dum la kunsido pri filozofio, etiko, religio, spiritualeco, psikologio aŭ politiko. Kion la meditanto trovos, tion li devas trovi per si mem.

- Antaŭ la kunsido, ĉiu meditadonto ekkonos la instrukciojn, kiujn poste lia akompananto rediros. Tiaj instrukcioj estas neŭtralaj, tamen se iu kredas ke io kontraŭas lian religion, etikon aŭ personecon, li povos diri ĝin al sia akompananto, kaj la akompananto modifos aŭ preterlasos la instrukcion. Se ne estas eble, oni povos foriri.

- La akompanantoj estas sennomaj, por eviti ke meditantoj projekciu al ili pozitivajn aŭ negativajn emociojn. La meditado estas individua, neniu povas labori anstataŭ vi ; kaj ne estas grave kiu estas via akompananto.

- Post kunsidado, devas pasi unu monato sen paroli kun sia akompananto, por garantii ke neniu influas meditantojn. Post unu monato, oni povas doni monon, partopreni en alia kunsidado, aŭ proponi sin por esti helpanto aŭ akompananto. Por esti akompananto, estas necese ke aliaj akompanantoj opinias ke oni estas preta.

HORARO

- * Je la 4-a matene : Vekiĝo
- * 4-a 30 ĝis 6-a 40 : Du horoj da meditado, kun dek minutoj por ripozi.
- * 6-a 40 : Ripozo.
- * 7-a : Matenmanĝo.
- * 8-a ĝis 9-a : Meditado en tuta kvieteco.
- * 9-a 10 ĝis 12-a 30 : Tri horoj da meditado, kun dek minutoj por ripozi ĉiuhore.
- * 12-a 30 ĝis 13-a : Ripozo.
- * 13-a : Tagmanĝo .
- * 14-a 30 ĝis 15-a 30 : Meditado en tuta kvieteco.
- * 15-a 30 ĝis 15-a 40 : Ripozo.
- * 15-a 40 ĝis 19-a : Tri horoj da meditado, kun dek minutoj por ripozi ĉiuhore.
- * 19-a ĝis 20-a : Vespermanĝo.
- * 20-a ĝis 21-a : Meditado en tuta kvieteco.
- * 21-a ĝis 21-a 30 : Ripozo.
- * 21-a 30 : Enlitiĝo.

GRAVE : Bonvolu legi trifoje ĉi tiun informon, antaŭ ol aliĝi al meditado. (Vidu adreson sur p.27)

Forpasintoj

Honora prezidanto de IKUE

Patro Alfons J. Beckers (1908), forpasis la 18-1-1994, en Heusden (B). Li estis prezidanto de *Internacia Katalika Unuiĝo Esperantista* de 1945 ĝis 1965. (Vidu la artikolon de Carlo Sarandrea en *Dia Regno*, n-ro 755, julio 94.)

Budhista mecenato

La somersolstican vesperon tri ASISTI-anoj¹ ĉeestis, en la "*Ŝin-Templo de la Lumo de l'Pardonemo*"² en Antverpeno, la celebradon de la 49-a tago post la morto (la fina kaj plej grava funebra ceremonio en budhismo) de S-ro **Yehan Numata**, 96-jara japana industriisto, fondinto de "*La Mitsutoyo fabrikkompanio*".

En la 1920-aj jaroj, vizitante Usonon, li decidis fariĝi riĉega. Sed ne por si mem : por ebligi la disvastigon de la budha instruo. Li kreis entreprenon de precizegaj mezuriloj, kiu iom post iom fariĝis fama en la tuta mondo : ĝi ekzemple estas la liveranto de la usona NASA. Kaj li komencis paralele disvolvi la budhisman muzikon kaj disvastigi la bildojn kaj instruon de Budho. En 1962, kiel memorigon de la enkonduko, tiam antaŭ 70 jaroj, de Budhismo en Usonon, li eldonis anglan tradukon de *Budhistaj tekstoj nove tradukitaj*, kompilaĵo publikigita en 1925 de d-roj Shûgaku Yamabe kaj Chizen Akanuma en kunlaborado kun multaj japanaj budhistaj majstroj, fine de laboro kiu estis daŭrinta pli ol kvin jaroj.

En decembro 1966³ li organizis ĉiujn aferojn rilate al disvastigo de Budhismo Sankta Skribo kaj oferis sian havaĵon por mondpaco. Tiel *Budhismo Misa Fonduso (Bukkyo Dendo Kyokai)* ekiris kiel oficiala organizo. Ĝi tuj ekkomencis disvastigi valoregan 270-paĝan libron konsistantan preskaŭ nur el citaĵoj el sanskritaj kaj paliak sutroj, Dhammapado, *Ĝataka*-oj ktp.

Farita el teksto reviziita kaj rekompilita en 1972 de Profesoroj Shoyû Hanayama, Kwansei Tamura kaj Take-mi Takase, la **esperanta traduko** *La Instruo de Budho* aperis en 1983⁴. Ĝi verŝajne estas la science plej valora esperantlingva verko pri Budhismo (verko jam tradukita al 37 lingvoj, el kiuj la lastaj estas la rusa kaj la araba).

1/ La red. de Asistilo, Lidia Kerremans, sekretariino ĉe "Movado sen Nomo", kaj ŝia amikino Katarina, membro de "La Verda Stelo".

2/ Ĝikoĝi, unu el la nur 3 oficialaj temploj de la Purlanda Budhismo en Eŭropo, kun la Duseldorf kaj Ĝeneva. Probable ankaŭ estos unu en Aŭstrio post unu aŭ du jaroj, kaj eble unu en Pollando pliposte.

3/ Aŭ 1965? Ĉiukaze baldaŭ estos do la 30-a datreveno.

4/ 297-paĝa, kun apendicoj pri la historio de Budhismo ktp.

(Interŝanĝa anonco)

LA JAPANA BUDHANO	
N-ro 272	MAJO - JUNIO 1994
ENHAVO	
卷頭言	石黒 漢子 1
Pri Atombombo en Nagasaki	TAKAHARA Ken 2
豆腐と私	ビネット 美代 8
仏教辞典のための予備調査	西 泰宏 14
お便りから	19
梵語通信の方法	西野 裕 20
Dougen parolis jene 正法眼蔵随聞録	西 泰宏 21
Libera Forumo, Pri ekumenaj agadoj	SINDO-Seitaro 23
Enkonduko al Sanskrito	25
ASISTILO	28
目次, El Redakcio	29
目次	

Esperantista Rabeno

Mi legis noticon en gazeto ke Rabeno Profesoro Ezra Zion Melamed mortis la 9-an de marto en Jerusalemo, 91-jara. Foje mi renkontis lin kun grupo da esperantistoj kiam ni pasis preter lian hejmon dum la jara *Jerusalema Marŝado* kaj li invitis nin por iom trinki kaj manĝeti.

Rabeno Melamed estis unu el la pioniroj de Esperanto en Jerusalemo, lerninte Esperanton 20-kaj-kelkajare aĝa, de Natan Ben-Cion Havkin kiu jam en 1924 starigis la esperantan societon *Paco kaj Frateco*. Rabeno Melamed eldonis en 1927 la unuan Esperanto-Hebrean vortaron, kun gramatiko, nemultaj ekzercoj kaj legindaĵoj.

Ankaŭ familie Melamed uzis esperanton ĉar per ĝi li renkontis sian estontan edzinon kiu estis bona esperantistino. Melamed estis vegetarano kiel Havkin kaj ili fariĝis bonegaj amikoj. La filo de Melamed rakontis al mi ke Havkin ofte venis viziti ilin ĝis sia morto en 1957.

Krom Esperanto Rabeno Melamed havis multajn okupojn. Li naskiĝis en Ŝiraz en Irano kaj studis Biblion kaj grekan lingvon en la Hebrea Universitato. Poste li fariĝis membro de la Hebrea Akademio kaj en 1987 li ricevis la Israelan Premion pri *parŝanut*, t.e. klarigoj pri la Torao kaj la Sanktaj Skriboj.

Estu lia memoro benata !

Jeremi Gishron

El *Jerusalema Bulteno*, n-ro 14, Pasko 5754 (1994), p.4 .

Paca kunbatalanto de Martin Luther King

La Pastoro Glenn Smiley, 83-jara, mortis la 14-9-93 en Los Angeles pro koratako. Malperforta aktivulo, li estis unu el la kunuloj de la Pastoro Martin Luther King en la batalo por la egaleco de la usonaj Nigruloj. Metodista pastoro naskiĝinta en Loraine (Teksaso) en 1910, li estis dum 25 jaroj membro de la usona nacia sekretariejo de la Internacia Movado de la Reamikiĝo (MIR). Koscienkobĵetanto li estis malliberigita ekde 1943 dum unu jaro kaj duono pro rifuzo servi en la armeo.

Dum la busbojkotado en Montgomery en 1955-56, li estis, apude de Pastoro King, instruanta malperforton en la preĝejoj kaj helpanta al la organizado de la lukto. La 21-an de decembro 1956 li estis kun Pastoro King en la unua buso kiu ekfunkciis en Montgomery post la malsegregaciigo, spite de la minacoj de Ku Klux Klan (...)

Li instruadis malperforton, ĉefe en Sud-Ameriko, Filipinoj kaj Karibaj insuloj. En 1990 Glenn Smiley fondis la Centron Martin Luther King por Malperforto en Los-Anĝeleso kie li prelegis kaj gvidis staĝojn por junuloj, bandanoj kaj paroĥoj (103 prelegoj en 1992 !)

El "Non-Violence actualité" n-ro 177, februaro 1994, p.2 . (Adreso : BP 241, F-45202 Montargis cedex).

Mormonoj : nova prezidanto

Howard W. Hunter, 86-jara eksa advokato, estis elektata la 6-an de junio 94, kiel 14-a porviva prezidanto de la mormona Eklezio, por anstataŭi Ezra Taft Benson, entombigitan du tagojn pli frue.

Fondita de Jozefo Smith en 1830, la *Jesu-Krista Eklezio de la sanktuloj el la lastaj tagoj* nombras inter 3 kaj 9 milionojn, laŭ malsamaj fontoj, da anoj ĉefe en Usono (Utaho, kaj Misurio por la "reorganizita" branĉo).

Laŭ la belga ĵurnalo "Le Soir", 8-6-1994, p.26 .

Nuntempaj spiritaj mesaĝoj

La vortoj "*privata revelacio*" estas uzataj de la Katolika Eklezio por doni nomon al ĉielaj mesaĝoj ricevitaĵoj de infanoj aŭ aliaj.

Tamen la ricevantoj ricevas ankaŭ alvokon publikigi tion kion ili aŭdis.

Pro tio la vorto "*privata*" ne plene respegulas, ekzemple, aparaĵojn de Maria al infanoj en Lourdes, Fatima aŭ Medjugorje.

Pro tio la vorto "*privata*" eĉ malpli decus ekzemple por Muĥamado, kiu transdonis la diktitan Koranon al tiom da homoj!

Ŝajnus al mi pli ĝuste diri ke Dio neniam ĉesis sendi profetojn al la homaro.

En nia epoko ili speciale abundas.

Inter ili, ŝajnas atentindaĵoj la aperoj de Jesuo al Michel Potay en 1974.

Jen ekzemple la teksto de la tiel dirita "*Patro nia*" laŭ la mesaĝo de Jesuo al Michel Potay :

*" Patro de l'Universo,
Vi sola sanktas.
Reĝu super ni Via Sankto
por ke ni faru Vian Volon,
por ke ni ricevu nian nutron,
por ke ni povu pardoni
kaj ricevi pardonon,
por ke ni rezistu al tentoj
kaj defalu la maliculo,
por ke reĝu super ni por ĉiam
Via Sankto, Via Potenco kaj Via Lumo ! "*

En tiu preĝo sentebblas la forta ligilo inter la homa sanktiĝo - aŭ diiĝo - kaj ĉiuj sekvaj petoj, ankaŭ la neceseco de la homa agado por konstrui la dian regnon, t.e. la dian volon. Ĉar fakte Mateo kaj Luko ne havas la saman tekston, mi kredemas Jesuon kiam li diras al Michel Potay :

"Aŭskultu, homo Michel, jen la preĝo de la pekuloj, tia kiam mi transdonis ĝin al miaj atestantoj, sed kiam ili ne kapablis transdoni al la mondo".

François Degoul

(Sekvote)

Eksa Jugoslavio

Pripensoj

"Ek kiam regos am' sur ter'
trubadiĝos la soldato..."

Kun la kroata poeto Vesna Skalzer,
mi senlace demandas min :
"Kial inter la popoloj milito kaj tim',
se herbo same verdas kaj same odoras
ambaŭflanke de ĉiu lim';
se ĉie fluas riveroj kaj ĉie la pontoj
same staras super la bluaj ondoj ?"
Kial tiom da sango verŝita,
tiom da malamo, da maltoleremo ?

Kial ?

Homo, mia frato, vekigu !
Ekkonsciu pri la potenco de via volo ;
faligu la dikajn, blindigajn murojn
de via interna fortikaĵo ;
kaj ĝislarme emociita,
vi malkovros en via koro,
similan al nekonata floro
de ĝardeno ekzotika,
tiun lumon, tiun magian "sunon",
kiu finfine kunigos la popolojn
en la viviga lando de l'Amo ;
de tiu Amo kiu alportas
pacon kaj feliĉon en nian mondon.

Homo, anstataŭ ol detruai,
klopodu konstrui Amon,
kiel niaj prapatroj starigis katedralojn...

Michele Freud

Songô

Antaŭmallonge iun matenon mia filo, 12-jara, diris al mi ke li sonĝis ke li fariĝis amiko kun iu el Zagreb, Kroatio. Aktuale tio ŝajnas ebla nur en sonĝoj. Mi esperas ke tio denove eblos reale. Sed granda nombro da homoj restas kun multe da reciproka malamo kaj amareco, en multaj kazoj ĉar ili estis reale mistraktataj de la alia flanko, kvankam en iuj kazoj vi ne certas kiu flanko faris la malbonon ĉar blindaj kolero, bombado kaj kaŝpafado en multaj kazoj mortigas tiujn kiuj estas la viaj - eĉ uzante "la viaj" en tre mallarĝa senco.

De serba membro de la WCRP-familio en Beogrado *

* WCRP : Monda Konferenco pri Religio kaj Paco. El "Religion for Peace : a newsletter on multi-religious dialogue and action for peace, issued by the WCRP" [Religio por Paco : nova]letero pri multreligia dialogo kaj agado por paco, eld. de WCRP], n-ro 63, aŭtuno 1992, p.4.

Interreligia milito, ĉu vere ?



De Profesoro Shitoku A. Peel

Kunfondinto kaj dekano de F.V.G., la Fakultato de Komparaj Religiaj Sciencoj en Antverpeno*. Li estas Profesoro pri Budhismo, Orienta Filozofio, kaj Religio-historio.

Religio estas, sendepende de nia konscio aŭ ne pri tio, reganta elemento de la kulturo de popolo, kiu havas decidigan influon sur la komunajn sintenojn de la membroj de la socia korpo. Cetere eĉ ne necesas ke ĉiuj individuoj el kiuj konsistas tiu socio estu "kredantoj".

Fakte, per siaj spirita, socia, politika kaj filozofia konsistaĵoj, religio efikas sur la naturon kaj la sintenojn de tiu socio. Ni memorigu ekzemple ke la tuta okcidenta penso inkluzive kapitalismon kaj marksismon, estas stampita, eksplicite aŭ implicite, de la plurcentjara alportado de la judkristana civilizacio (...)

De pluraj jardekoj la religia konsistaĵo stampas multajn konfliktajn situaciojn de la eŭropa sceno : protestantoj kaj katolikoj en Nord-Irlando, ortodoksaj serboj kontraŭ islamaj bosnianoj (...)

La termino religio ne estas komprenata ĉi tie kiel teologia sistemo aŭ filozofia ekspliko de la vivo, sed kiel psiko-kultura sistemo kiu, kiel la lingvo, konsistigas la "koloron" de nacio, popolo, etno, tribo (...)

La tri federaj respublikoj [Kroatio, Bosnio kaj Serbio] disŝiras unu la alian ne nur en la nomo de sia historia pasinteco, sed ankaŭ elvokas la diferencon inter siaj tri religioj ; de tio la esprimo "religia milito" uzata de multaj ĵurnalistoj.

Sed la Historio preskaŭ neniam konis veran religian militon. Ĉiufoje kiam religiaj formoj aŭ institucioj alfrontas unu la alian, aliaj motivoj, soci-, ekonomi-, politik-karakteraj enmiksiĝas. La propagando de la kredo "en la ombro de la spado" [dank'al militaj venkoj] konsistigas, certe, fortan motivon, sed tiu ĉi neniam estas la sola. Oftege la religia slogano nur servas kiel masko por tiom pli materiaj celoj...

El la artikolo "Européens et immigrés : quelle cohabitation ?" [Eŭropanoj kaj enmigrintoj : kia kunloĝado ?], el "EURinfo" n-ro 178, sept. 1993, p.10-12, eld. de la Buroo de la Komisio de la eŭropaj komunumoj

* Fondita en 1980. Lydia Kerremans (unu el niaj belgaj legantinoj, sekretario de "Movado sen nomo") prezentis ĝin en Asistilo n-ro 4.

Zajedno ["Kune"] en Sarajevo

Tiu Internacia Centro por Disvolvo de Interreligia Dialogo, Justeco kaj Paco estis fondita la 10-12-91. Pro la tieaj eventoj jen la kontaktadreso en Germanio : Marko Orsolice, c/o Klaus Klein, Lange Zeile 10, D-8058 Ercling (faks. +49 8122 5022).



THE INTERNATIONAL CENTER FOR PROMOTION OF INTERRELIGIOUS DIALOGUE,
JUSTICE AND PEACE

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЦЕНТР ПООЩРЕНИЯ МЕЖРЕЛИГИОЗНОГО
ДИЯЛОГА, ПРАВДЫ И МИРА

المركز الدولي لتعزيز الحوار بين الاديان و العدل و السلام

CENTRE INTERNACIONAL POUR PROMOTION DU DIALOGUE INTERRELIGIEUX,
DE LA JUSTICE ET DE LA PAIX

EL CENTRO INTERNACIONAL PARA LA PROMOCIÓN DEL DIALOGO INTERRELIGIOSO,
LA JUSTITIA Y LA PAZ

